



# EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

6

1970

# Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon.

Maŭ Zedong

La brila instrukcio de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**” estas la fundamenta direkto por disvolvi la kuracan kaj higienan aferon de nia lando, la ĝenerala programo kaj la gvida principo por la kuraca kaj higiena laboro. En la alta tajdo de batalo, kritiko kaj reformo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, profundiginte en la kamparon, la vastaj amasoj de la medicinaj laborantoj fervore helpas diverslokajn vilaĝojn efektiviĝi sistemon de kooperativa kuracado, kulturigas “nudpiedajn kuracistojn”, vaste elfosas la medicinan heredaĵon de la patrio, kolektis naturajn kuracajn materialojn, faras malsanopreventon kaj kuracadon por la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj konstante plibonigas la kuracan kaj higienan staton de la vasta kamparo. Kaj tiamaniere, ili efike protektas la sanon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj akcelas disvolviĝon de la revolucio kaj produkto.





Profundiĝinte en la garnizonatan kamparon, kamaradoj de la Avangarda Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo de PLA varme helpis malriĉkampanojn kaj malsuperajn mezkampanojn starigi sistemon de koopera kuracado kaj kune kun "nudpiedaj kuracistoj" kuracis longne nekuraceblajn oftajn kaj kronikajn malsanojn per indiĝenaj receptoj kun ĉinaj tradiciaj drogoj. Jen ili ĝoje interparolas kun resanigita kronika paciento.



En la kuracado, Huang Juhiang (la dua maldekstre), juna kuracisto de la hospitalo de Giangĝen-komunumo de Ĉuanŝa-gubernio de Ŝanhajo, fervore kulturis “nud-piedajn kuracistojn” kaj tutkore kaj tutanime servas al malriĉkamparanoj kaj mal-superaĵ mezkamparanoj.

Profundiĝinte en vilaĝojn de nacimalplimulto, la kuraca taĉmento de iu trupo de PLA faras kuracadon por la popoloj de diversaj naciecoj. Jen taĉmentanino faras akupunkturon al komunumaninoj de Li-nacio.






Ĝaŭ Ginĉeng (injektanta), intelekta junulo el Pekino fiksloĝinta en la kamparo de Jan-an-gubernio, ĝuas laŭdon de la amasoj pro sia tutkora kaj tutanima servo al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.







Profundiĝinte en la Li-nacian regionon de Hajnan-insulo, kamaradino Ma Ji (meze), milita kuracistino kaj elstara komunistino de iu trupo de la Liberiga Armeo, faris malsanopreventon kaj kuracon por la komunumanoj. Jen ŝi kaj aliaj kamaradoj de la kuraca taĉmento kune propagandas Maŭzedongpenson al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

La stacio de koopera kuracado de Suĝuang-brigado de Lijuan-komunumo de Tuoĉeng-gubernio de Henan-provinco konstante instruas al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la sciojn pri drogherboj kaj kuracado per ili, mobilizante la amasojn disvolvi la laboron en tiu sfero.



# La Vojo de Disvolviĝo de la Ĉina Medicino

**S**UB la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, vasta perspektivo prezentigas por la medicina afero de nia lando.

## SERVI AL LA LABORANTA POPOLO

Kiun servi estas la fundamenta demando de direkto, kiu decidas la disvolviĝon de medicino. En klasa socio, medicino ĉiam servas al certa klaso. En malsama socisistemo, ĝi havas malsaman direkton de disvolviĝo.

En la granda socialisma Ĉinio, medicino estas komuna riĉaĵo de la laboranta popolo. Medicino por servi al la popolo estas la kerno de la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ, la fundamenta postulo de la socialisma sistemo al medicino kaj ankaŭ la fundamenta direkto de disvolviĝo de medicino.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ ĉiam zorgas pri la popola higiena afero, kaj tiel frue kiel en la periodo de novdemokratia revolucio li jam montris: **“Ni devas aktive preventi kaj kuraci malsanojn por la popolo kaj disvastigi la medicinan, farmacian kaj higienan aferon de la popolo.”** Dum la periodo de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado, Prezidanto Maŭ faris serion da gravaj instrukcioj, kiu klare difinis la linion, direkton kaj politikojn de nia higiena laboro, kaj tiel montris la antaŭenmarŝan direkton por la disvolviĝo de nia medicino.

Ĝuste sub la brila gvido de la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ, nelonge post la Liberigo de nia lando, ni jam rapide katenis aŭ eliminis multajn epidemiojn kaj infektajn malsanojn, kiuj serioze minacis la sanon kaj vivon de la popolo, kaj finis la tragikan scenon de la malnova Ĉinio, ke la laboranta popolo havis nek kuracistojn nek kuracilojn kaj devis morti surstrate.

Depost la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, en la medicina sfero longe ekzistis intensa batalo inter la du linioj ĉirkaŭ la problemo kiun servi. La renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki sin kaŝinta interne de la Partio kaj liaj agentoj en la higiena branĉo obstine antaŭenpuŝis kontraŭ-revolucian reviziisman higienan linion servantan nur al malmultaj homoj kaj freneze oponis kontraŭ la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ.

En 1965, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon al la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj: **“Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon.”** La esenco de tiu granda instrukcio estas nenio alia ol persisti en la fundamenta direkto de medicino servi al la popolo. Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ, miloj kaj dekmiloj da revoluciaj medicinaj laborantoj iris al montaroj kaj kamparoj por enprofundiĝi en bazajn unuojn kaj enradikiĝi en la amasojn, akcepti reedukon fare de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj preventi kaj kuraci malsanojn

por ili tutkore kaj tutanime; kaj samtempe sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **“konduku amasan movadon en ĉia laboro”**, ili kombinas la higienan laboron kun amasaj movadoj kaj ĉiuflanke antaŭenpuŝis la popolan aferon de medicino, farmacio kaj higieno. La novnaskita socialisma koopera kuraca sistemo en la kamparo disfloras ĉie tra nia tuta patrolando kiel buntaj sovaĝfloroj kaj akcelis novan disvolviĝon de la medicina kaj higiena afero de la kamparo. Armeo de **“nudpiedaj kuracistoj”** tre bonvenigataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sane kaj rapide kreskas kvazaŭ printempaj bambuidoĵ post pluvo. Nun rapide disvolviĝas amasa movado de apliko de nova kuracmetodo en kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj kaj preventado kaj kuracado de ordinarnaj kaj oftaj malsanoj per ĉinaj medicinaĵoj kaj kurac-herboj. La kuraca kaj higiena stato en la vasta kamparo estas trairanta gigantan revolucionan ŝanĝon.

La vastaj amasoj de medicinaj laborantoj kaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj armitaj per Maŭzedongpenso estas kombinantaj revolucionan kuraĝon kun scienca spirito kaj kreas miraklojn post mirakloj. Ili sukcese elprenis 45-kilograman tumoron per simplaj ekipaĵoj kaj kun malmulta sperto; ili ebligis al surdmutuloj eligi la plej fortan voĉon de la epoko **“Vivu Prezidanto Maŭ”** kaj vidiĝis al blinduloj la ruĝan sunon kaj denove starigis paralizitojn per kelkaj arĝentaj akupunkturaj pingloj, sukcese kuracis kronikan keŝan-malsanon per nova simpla kuracmetodo, sukcese rekunigis superan membron rompitan en tri partojn kaj redonis vivon al juna ruĝa gvardiano, kiu heroe partoprenis estingon de fajrego kaj estis brulvundita je 98% de la tuta korpo kaj kies koro ĉesis bati dum 25 minutoj. La apero de tiuj novaĵoj de senlima vivforto kaj senprecedencaj mirakloj sur la medicina kaj higiena fronto de nia lando estas

*Kuracaj laborantoj de ĈPLA-trupo garnizonanta la Tu-nacian Aŭtonoman Gubernion de Huĝu de Kinghaj-provinco profundigās en la kampojn por kuraci kaj preventi malsanojn por komunumanoj. Jen ili studas kune kun komunumaninoj Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong.*





granda venko de la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ! Ĝi estas granda venko de la Granda Proletara Kultura Revolucio! Kaj ĝi estas ankaŭ giganta frukto akirita de la medicinaj laborantoj en persistado ĉe la fundamenta direkto de servigo de medicino al la popolo!

Persisti en la ĝusta direkto de servado al la plejmulto kaj oponi kontraŭ la erara direkto de servado al malplimulto signifas profundan ideologian revolucion por la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj. La ŝanĝoj de "altklasaj kuracistoj" servantaj al malmultaj homoj en urboj en "nud-piedajn kuracistojn" servantajn al la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, de atendado de pacientoj en domegoj en personan viziton al pacientoj kun medikamenta kesto, de sindisigo de la amasoj en forlason de sinjora sinteno por fariĝi ordinara laborulo, ŝanĝoj grandaj kaj abruptaj en la diversaj flankoj de penso, stilo, laboro kaj vivkutimo tuŝis la animon de ĉiu el la medicinaj laborantoj. Sub la reeduko fare de la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, ne malmultaj homoj el la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj harditaj en la Granda Proletara Kultura Revolucio ŝanĝis sian penson kaj sentimenton kaj atingis elstarajn sukcesojn en sia servado al la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kaj estas varme bonvenigataj de ili. Disvolvante la proletaran internaciisman spiriton laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, niaj eksterlandaj senditaj medicinaj laborantoj servas tutkore kaj tutanime al la popoloj de la koncernaj landoj sen timo al penoj kaj laciĝo, faris multajn kortuŝajn aferojn en savado de mortantoj kaj vunditoj, kaj ĉie rikoltis laŭdojn de tiuj popoloj.

## MATERIISMA DIALEKTIKO APLIKATA EN LA MEDICINO DE NIA LANDO

En la sfero de medicino ĉiam ekzistas la batalo inter materiisma dialektiko kaj metafiziko. Materiisma dialektiko opinias, ke por la homaro la kono pri malsanoj kaj kapablo de venko de ili disvolviĝadas kaj progresadas, dum metafiziko opinias, ke tiuj kono kaj kapablo stagnadas kaj ĉiam restas senŝanĝaj; materiisma dialektiko opinias, ke malsano strikte interligiĝas kun la tuta korpo de la paciento, dum metafiziko prenas malsanon kiel izolan fenomenon; en batalado kontraŭ malsanoj, materiisma dialektiko plene disvolvas la subjektivan aktivecon de homo, konsiderante la

faktorojn de ambaŭ materio kaj homo, dum metafiziko superstiĉe sin apogas sur tekniko kaj ĵekipajoj, konsiderante nur pri la faktoro de materio sed ne tiu de homo.

Materiisma dialektiko diras al la homoj, ke ĉio en la mondo estas en movado kaj disvolviĝo kaj ankaŭ la konado kaj reformado fare de la homoj al la objektoj estas senĉese disvolviĝantaj. Prezidanto Maŭ diris: **"La ŝanĝiĝado de la objektiva reala mondo neniam finiĝos, tial la homa konado pri vero tra la praktiko ankaŭ neniam kompletiĝos."** Sekve de tio, ke la homa kono pri malsanoj kreskas de nuleco al ekzisto kaj de nemulteco al multeco, ankaŭ medicino iom post iom disvolviĝas. En la mondo ne ekzistas absolute "nekuracebla malsano". La estiĝo de ĉia ajn malsano havas certajn kondiĉojn kaj kaŭzojn, kaj se nur tia malsano ekzistas, do la homoj povas iom post iom koni la internajn kaj eksterajn kaŭzojn de ĝia estiĝo kaj trovi rimedojn por ĝin venki, en la procezo de batalado kontraŭ ĝi. Same kiel tio, ke hodiaŭ ni jam povas kuraci malsanojn, kiujn oni konsideris "nekuraceblaj" en la pasinteco, la hodiaŭaj "nekuraceblaj malsanoj" fariĝos kuraceblaj en morgaŭo, post kiam ni plene konos ĝin kaj kaptos ĝian leĝon. Kompreneble ni devas malfacile penadi por atingi tion kaj ankaŭ eble trafos malsukcesojn. Sed la asertantoj de "nekuraceblaj malsanoj" rigardas la hodiaŭ nekuraceblajn malsanojn kiel absolute nekuraceblajn en eterneco. Tio estas vidpunkto de stagno. Tia metafizika vidpunkto tute ne konformas al la historia fakto de la disvolviĝo de medicino. Ekzemple, sekvaĵo de poliomjelito estas konsiderata de en- kaj eksterlandaj burĝaraj medicinaj "aŭtoritatuloj" kiel "nekuracebla malsano" kaj rigardas ĝin kiel t.n. "netrairebla pasejo" en la medicina historio. Sed arminte sian cerbon per Maŭzedongpenso kaj uzante materiisman dialektikon por gvidi sian praktikon, ordinara medicinaj laborantoj de nia Popola Liberiga Armeo sukcesis krei novan kuracmetodon kaj turnis la "nekuraceblan malsanon" en kuraceblan. La diferenco inter la vortoj "nekuracebleco" kaj "kuracebleco" estas nur unu silabo, tamen ĝi respegulas la batalon de du malsamaj mondkonceptoj en la sfero de medicino.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"En la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas; ili neniam restas sur la sama nivelo."** La medicina teorio senĉese disvolviĝas en prak-

tikado. La "limoj" notitaj en la medicina literaturo senescepte estas formitaj en certaj historiaj kondiĉoj sed ne senŝanĝaj absolutaĵoj. Ni certe povas trovi novajn kuracmetodojn, krei novajn teknikojn, elhaki novajn vojojn kaj disvolvi novajn teoriojn, se nur ni direktas nian kuracan praktikon per la filozofia penso de Prezidanto Maŭ; kaj ni certe povas korekti erarojn kaj trapasi la t.n. "limojn" en medicino.

Ni prenu kuracon de rompita osto kiel ekzemplon, iu skolo opinias, ke por tio la pacientoj devas nur "tute ripozi kaj absolute fiksiĝi". La skolanoj vidas nur la parton de la rompita osto, sed ne la tutan membron kaj la tutan korpon; ili vidas nur tion, ke moviĝo de la vundita membro malutilas al ĝia rekunkresko, sed ne tion ke moviĝo de la vundita membro utilas al la rekunkresko de la rompita osto; ili vidas nur en unu flanko, ke fiksado utilas al rekunkresko de parta rompita osto, sed ne vidas en la alia flanko, ke tio malutilas al la rekunkresko de la rompita osto kaj restarigo de la funkcio de la tuta membro. Tia kuracmetodo de nura zorgo pri parto kaj neglekto pri la tuto estas kontraŭa al la leĝo de fiziologia aktivado de membroj kaj malhelpas la aktivadon de la tuta membro kaj la tuta korpo kaj kaŭzas multajn mankojn kiaj malrapida rekunkresko de rompita osto, longa kuracado, malbona restarigo de la funkcio kaj multeco de komplikajtoj. Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ, ke **"la leĝo de unueco de kontraŭoj estas fundamenta leĝo de la universo"**, revoluciaj medicinaj laborantoj de nia lando ĝuste traktis la rilaton de unueco de kontraŭoj, nome tiun inter "senmoveco" (fiksado de rompita osto en reĝustigiteco) kaj "moveco" (movado fruperioda de vundita membro) kaj tiun inter parto kaj la tuto, alprenante la avantaĝajn metodojn de ĝusta rekunigo de rompita osto en la okcidenta medicino kaj fiksado per tabuletoj en la ĉina medicino. Tiamaniere, unuflanke oni tenas la koncernan parton en relativa fiksateco kaj efike limigas malutilajn moviĝojn de la rekunmetitaj finaĵoj de la rompita osto, kaj aliflanke kreas kondiĉojn por movado de la tuta membro kaj la tuta korpo, tiel ke la koncerna membro povas havi konvenan ekzercon de sia funkcio dum la rekunkresko de la rompita osto kaj plene disvolvas la utilon de la movado al la rekunkresko de rompita osto, kaj sekve de tio oni akiris rimarkindan sukceson, ke la rompita osto rekunkreskas rapide, la kuraca periodo estas mallonga, la funkcioj bone restariĝas kaj la komplikajtoj malmultas. Tiu nova kuracme-

tudo taŭgas por kuraci la plej oftajn ostrompiĝojn de diversaj partoj de la homa korpo, inkluzive de la relative malfacile reĝustigebla duobla ostrompiĝo de antaŭbrako, kaj ĝia apero grandpaŝe antaŭenpuŝis la kuracadon de rompita osto. Tio estas ja venko de materiisma dialektiko en medicino.

La fundamenta kaŭzo de la disvolviĝo de afero estas la kontraŭdiro interne de la afero. Prezidanto Maŭ diris: **"Materiisma dialektiko konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj."** Same tiel estas en kuraco de malsanoj. Gravaj estas la medikamentoj, sed ili povas efiki nur pere de la interna kaŭzo de homo.

La vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj de nia lando havas altan politikan konscion kaj estas multaj kazoj, ke grava malsano estas venkita pro iliaj aktiva kunago en kuracado kaj firma revolucia batalvolo. Ekzemple, iu juna laboristino, kiu ricevis gravan brulvundon de 98% de la tuta korpo kaj la areo de la 3- kaj 4-gradaj brulvundo atingis la ciferon de 88%, vive studis kaj vive aplikis Maŭzedongpenson, venkis ĉiajn malfacilojn kaj regajnis sian sanon kun la revolucia spirito de nefleksebleco kaj obstina persistemo de la laborista klaso. Iu aviadisto kun fidela koro por defendi Prezidanton Maŭ kaj defendi la socialisman patrolandon venkis kanceron per obstina revolucia volo kaj denove flugas sur la blua firmamento. Tiuj faktoj montras, ke ankaŭ la subjektiva spirita faktoro de la paciento estas neneglektenda flanko.

## KOMBINO DE LA ĈINA KAJ OKCIDENTA MEDICINOJ

La ĉina medicino estas granda trezorejo. Antaŭlonge la granda gvidanto Prezidanto Maŭ jam montris, ke la kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj devas unuiĝi kaj kunlabori por ordigi kaj esplori la ĉinan medicinon kaj ĉinan farmacion per modernaj sciencaj scioj kaj metodoj, por krei unuecajn novajn medicinon kaj farmacion de Ĉinio. Tio ĉi estas peniga kaj glora historia tasko kiu sin prezentas antaŭ la vastaj amasoj de la ĉinaj kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj. Sed la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la higiena branĉo diskriminaciis, forpuŝis kaj tute neis la medicinon





*Kuractaĉmento de Kantona Trupo de ĈPLA propagandas higienajn sciojn pri prevento de malsanoj en la kamparo, helpante komunumanojn disvolvi patriotan higienan movadon.*

de la patrio, staris kontraŭ la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ kaj senbride subfosis la politikon difinitan de Prezidanto Maŭ rilate al la ĉina medicino.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj forte kondamnis la damnindajn krimojn de Liu Ŝaŭki kaj profunde komprenis, ke kombini la ĉinan kaj okcidentan medicinojn laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ estas la ĝusta vojo por disvolvi la medicinon de nia lando. La ĉinaj medicino kaj farmacio havas historion de miloj da jaroj, ili estas kristaloj de la riĉaj spertoj akumulitaj de la ĉina popolo en sia longa batalo kontraŭ malsanoj kaj faris grandan kontribuon al la generado kaj prosperiĝo de nia nacio. La okcidenta medicino estas medicino elvolviĝinta sekve de la disvolviĝo de la modernaj naturaj sciencoj kaj

ĝi alprenis sciojn kaj metodojn de la modernaj sciencoj. Ankaŭ ĝi estas kristalo de la saĝoj de la laboranta popolo kaj ankaŭ en ĝi akumuligis tre multaj spertoj en batalo kontraŭ malsanoj. Ĉiu el tiuj du medicinoj elvolviĝintaj en malsamaj historiaj kondiĉoj havas siajn avantaĝojn kaj mankojn kaj ne povas anstataŭi unu la alian.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, kaj precipe post la komenco de la Granda Proletara Kultura Revolucio, nova fizionomio aperis kaj multaj sukcesoj estas atingitaj en heredado kaj disvolvado de la esencaĵoj de la medicino de nia patrio fare de la kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en la unuiĝo kaj kunlaboro. Iuj kuracmetodoj kaj medikamentoj de la ĉina medicino estas disvastigitaj kaj aplikataj en pli vasta sfero post pristudo kaj analizo, kaj multaj tradiciaj kuracmetodoj de la ĉina medicino ricevis grandan disvolviĝon kaj



iliaj kuracaj efikoj estas altigitaj. En sia reciproka lernado kaj solidara kunlaboro dum multaj jaroj, la vastaj amasoj de kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj kreis diversajn formojn de kombino de la du medicinoj kaj akumulis relative riĉan sperton. Laŭbezone, por iuj malsanoj oni aplikas la metodon de kuna diagnozo fare de kuracistoj de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, kuraco per metodo de la ĉina medicino kaj kuna observo de la kuracefiko kaj kuna resumo de sperto fare de kuracistoj de ambaŭ medicinoj; iujn malsanojn oni diagnozas kaj kuracas per metodoj de ambaŭ medicinoj, altigante la kuracan efikon per utiligo

de iliaj avantaĝoj kaj ŝtopo de iliaj mankoj. Dank' al kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, oni jam kreis novajn kuracmetodojn, por solvi problemojn nesolveblajn por la ĉina aŭ okcidenta medicino sola.

La tute nova progresinta medicino povas pli bone protekti la sanon de la vasta laboranta popolo, kontentigi la bezonon de la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de nia lando al medicino kaj samtempe ĝi estas ankaŭ granda kontribuo al la disvolviĝo de la medicino de la mondo.

*“Nudpiedaj kuracistoj” de Giaŭhie-komunumo de Haj-an-gubernio de Giangsu-provinco kaj kamaradoj de kuraca taĉmento de ĈPLA sunsekigas drogherbojn.*



# Kuraci Oftajn Malsanojn per Materiisma Dialektiko



*Kamarado Guo Ŝusu (la sidanta) faras eksperimenton pri la efiko de elektroterapio sur sia propra korpo.*

**M**I estas neŭrologo en iu hospitalo de ĈPLA. Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “Meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon”, nia hospitalo organizis kuracan taĉmenton, kaj kiel ĝia membro mi eliris el la hospitalo kaj profundigis en la trupojn kaj la kamparon. En praktikado ni uzis materiisman dialektikon kaj akiris kelkajn novajn spertojn en kuracado de oftaj malsanoj.

## TROVO DE EFIKA RIMEDO KONTRAŬ NEŬRASTENIO

Neŭrastenio estas ofta malsano en neŭrologio. Antaŭe oni ofte uzis sedativon aŭ dormigan medikamenton kontraŭ tiu malsano kaj povis forigi nur la simptomojn sed ne la radikon.

Por trovi efikan rimedon kontraŭ neŭrastenio, mi ripetade studis la brilan filozofian verkon de

Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj ricevis tre grandan inspiron. Prezidanto Maŭ instruis al ni: “El la du kontraŭdiraj flankoj unu estas la ĉefa kaj la alia neĉefa. La ĉefa flanko estas tiu kiu ludas kondukan rolon en la kontraŭdiro. La karaktero de objekto estas determinata precipe de la ĉefa flanko de la kontraŭdiro, kiu okupas la regantan pozicion.” Mi pensis, ke la homoj estas energio-plena en la tago kaj dormas en la nokto, tio estas normala fenomeno de alterno de eksciteco kaj inhibicio, sed la neŭrasteniuloj ne povas ekscitiĝi dum la tago nek bone inhibicii dum la nokto, perdinte la normalan funkcion de la nervoj.

El eksciteco kaj inhibicio, kiel du flankoj de kontraŭdiro, unu devas esti la ĉefa flanko rolanta kiel kondukanto. Ni ripozas por labori sed laboras ne por ripozi, sekve eksciteco ludas la kondukan rolon kaj oni devas trovi kontraŭrimedon ĉefe en konsidero pri tiu flanko. Sed laŭ literaturo pri neŭrologio oni ĝenerale donas fortigajn kaj



dormigajn medikamentojn por atingi kvietecon, t. e. klopodi en la flanko de inhibicio. Sed la praktiko montris ke tiu rimedo ne povas solvi la bazan problemon kaj kaŭzas ke la paciento ĉiam bezonas pli grandajn dozojn, sed la malsano ankoraŭ obstine restas. Mi decidis ŝanĝi la malnovan kutiman rimedon bazante mian klopodon sur plifortigon de la eksciteco de malsanuloj dumtage. Ĉar, se nur estas sufiĉa eksciteco, ĝi nature alkondukos konvenan inhibicion. Dank' al helpo de frataj hospitaloj kaj miaj kolegoj, mi trovis novan rimedon por pliigi la ekscitecon de malsanuloj dum la tago. Mi provis unue sur la korpoj de bestoj kaj poste sur mi mem, kaj konstatis, ke tiu metodo kaŭzas nenian malbonon al homa korpo. Tiam mi komencis apliki ĝin al iu paciento, kiu suferis gravan neŭrastenion je pli ol 20 jaroj. Post tritaga aplikado, unufoje en ĉiu tago, jam montriĝis evidenta rezulto. Nun la paciento havas plenan energion dum la tago kaj normalan dormon dum la nokto. Ĝis nun nia kuraca taĉmento jam kuracis pli ol 500 neŭrasteniulojn. Pli ol 80 elcentoj de la malsanuloj estis resanigitaj.

## NOVA VOJO POR KURACI DERMAN NEŬRITON

“Kiam ni rigardas iun aferon, ni devas ekzameni ĝian esencon kaj trakti ĝian aspekton nur kiel enkondukanton ĉe la sojlo, kaj transpaŝinte la sojlon ni devas tuj ekpreni ĝian esencon; nur tio estas fidinda kaj scienca metodo de analizo.” Tiu granda instruo de Prezidanto Maŭ estas tute aplikebla en diagnozo kaj kuracado. Se ni estas kaptitaj de iuj eksteraj fenomenoj de la malsano, ni ne povas solvi la problemon de ĝia radiko, alkröĉiĝinte al ĝiaj neesencaj montriĝoj.

Derma neŭrito estas ofte renkontata malsano. Estis jam kutimo inter kuracistoj diagnozi kiel derman neŭriton, se paciento perdis sentokapablon ĉe iu korpoparto, kaj kuracas ĝin per kontraŭinflamaj rimedoj. El mia kuraca praktikado mi dubis pri tia aserto. Laŭ mia opinio la perdo de sentokapablo kaŭzita de derma neŭrito estas nur fenomeno kaj la sama fenomeno povas

*Kamarado Guo Ŝusu (la tria de maldekstre) klarigas la elektroterapion pri oftaj malsanoj.*





aperi ĉe malsamaj malsanoj kiel speguliĝo de malsama esenco. Ni ne devas esti konfuzitaj de la fenomenoj. Mi faris detalajn enketojn pri la komenciĝo de la malsano de tiaj pacientoj kaj trovis ke ĝi ĝenerale estis rezulto de atako de humideco kaj malvarmo en malsama grado. Do la malsanon kaŭzis en tre granda probableco longdaŭra inhibicio de la periferiaj nervoj de certa korpoparto. Oni povas diri ke ĝi estas lokeca anestezo. Laŭ tiu rezono, mi opiniis ke derma neŭrito ne estas inflamo, sekve la kuracado ne devas baziĝi sur forigo de inflamo sed revenigi la ekscitecon de la periferiaj nervoj de certa korpoparto. Do mi kaj miaj kolegoj eltrovis rimedon ebligantan rapidan revenon de eksciteco al nervoj longe troviĝantaj en stato de inhibicio. Por certigi la efikon de la rimedo mi aplikis ĝin prove al mia propra korpo. Pruviĝis ke tiu rimedo povas fari la haŭton aparte sentema, tiel ke ĝi doloras ĉe ektuŝo. La suferon dum provado rekompencis la ĝojo pri tio ke ĝi bone efikas por eksciti dermajn nervojn, do eble ankaŭ por kuraci derman neŭriton.

Iu paciento suferis derman neŭriton jam de 4 jaroj kaj unu el liaj gamboj tiel sensentiĝis ke ĝi ne povis percepti enpikon de pinglo. Post diagnozo mi decidis kuraci lin per la nova rimedo laŭ mia persona sperto dum provado. Post la unua fojo de kuraco multe boniĝis lia stato, kaj post la dua fojo tute malaperis jam la malsano.

En pli ol unu jaro ni resanigis pli ol cent malsanulojn de diversaj dermaj neŭritoj kaj oftaj neŭritoj. La praktiko instruis al mi ke en ĉio oni devas kapti la esencon pere de eksteraj fenomenoj. Nur tiel oni povas kapti al si la objektivan leĝon de io, alpreni ĝustan rimedon por solvi la problemon kaj atingi difinitan celon en laboro.

## SPERTO DE KURACO DE LUMBA KAJ GAMBA DOLORO

Kiam ni rondiris por kuraco en la kamparo, ni ofte renkontis suferantojn de lumba kaj gamba doloro, kaj tio vekis nian atenton. Sed, kuraci tiun malsanon estis malfacila afero. Pro la reviziisma kuraca kaj higiena linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, la kuracistaj rondoj tute neglektis en la pasinteco tiun malsanon, kiu ofte kaj konstante suferigas laborulojn. Ni higienaj batalantoj armigitaj per Maŭzedongpenso devas servi tutkore kaj plenanime al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj

kaj nepre trovi kontraŭrimedon por forigi la suferon de klasaj fratoj.

Por venki tiun malfacilon mi kaj miaj kolegoj unue profundigis inter la amasojn por enketi la devenon de tiu malsano kaj detale ekzamenis la pacientojn, kiuj suferis tiun malsanon. Ni trovis ke ĉe la dolora korpoparto de plejparto de la pacientoj, precipe tiuj, kiuj ricevis traŭmon ĉe la lumbos por peza laboro, la muskoloj kaj aliaj histoj montras rigidecon, kiu estas fenomeno de kuntiriĝo de muskoloj, protekta aŭ patologia reago komuna al la animaloj. La kuntiriĝo kaj etendiĝo estas du flankoj de kontraŭdiro analoge al la eksciteco kaj inhibicio de la nervoj. Neŭrastenio rezultas el inverso de eksciteco kaj inhibicio kaj lumba kaj gamba doloro el malordo de kuntiriĝo kaj etendiĝo. El tio mi konkludis ke la kaŭzo de lumba kaj gamba doloro estas longdaŭra duonkuntiriĝo kaj duonlaciĝo de la muskoloj kaj aliaj histoj. Per ĉesigo de tiu stato kaj revenigo de malstreĉiteco oni certe povos forigi la suferon de la pacientoj kaj revenigi al ili la sanon. Krome, mi ekpensis pri la certa efiko de fizioterapiaj rimedoj en kuraco de lumba kaj gamba doloro. La efiko venis de tio, ke ili ebligis certagradan etendiĝon al la muskoloj kaj aliaj histoj. Sed, ĉar la etendiĝo ne estis plena, sekve la malsano ne povis komplete malaperi. Kiel ebligi ĝisfundan etendiĝon al la histoj? Mi pensis tiam ke, se mi per iu efika rimedo kreos fortan ekkuntiriĝon de la muskoloj kaj aliaj histoj, kiuj longe troviĝis en la stato de duonkuntiriĝo, tiam devos veni la stato de sufiĉa etendiĝo. Post supre menciitaj esploro kaj analizo estis trovita la leĝo de lumba kaj gamba doloro kaj ankaŭ akirita la iniciativo en la kuracado. Kune kun miaj kolegoj mi faris multajn atentajn provojn kaj ricevis bonajn rezultojn. Ekzemple, ĉe iu maljuna avo, kiu suferis lumbdoloron pro tro peza laboro en la malnova socio kaj ne povis rektigi sian talion, ni faris nur kvar kuracojn kaj sukcesis forigi lian malsanon. Aplikante tiun saman principon, ni ricevis bonajn rezultojn ankaŭ en kuracado de reŭmatismo, hipertrofia artrito de spino, akuta tordotraŭmo, iskiatiko kaj aliaj oftaj malsanoj. Ĝis nun ni faris kuracon al 500 kazoj de lumba kaj gamba doloro kaj el tiuj la procentoj de efiko atingis 90 kaj tiu de resaniĝo superis 50.

En rondira kuracado, nia taĉmento lernis kaj aplikis materiisman dialektikon en kuracado de oftaj malsanoj kaj atingis certajn sukcesojn. Ni decidis daŭre klopodi por fari novajn progresojn kaj pli bone servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sub la brilo de Maŭzedongpenso.

# Rondira Kuractaĉmento sur la Stepo Banma

**S**UR la stepo Banma en la baseno de Dadu-rivero ĉe la supra parto de Jangzi-rivero aktivas kuracaj laborantoj, kiuj fervore kuracas kaj preventas malsanojn al la paŝtistoj. Ili estas rondira kuractaĉmento sendita de la higiena kaj epidemipreventa stacio de Kinghaj-provinco al Banma de la Guoluo-a Tibetnacia Aŭtonoma Subprovinco.

Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**” kaj laŭ la vojo trairita siatempe de la Ruĝa Armeo dum la Longa Marŝo, la taĉmento profundigis en la montojn de Bajan-Kara 4000-5000 metrojn altajn super la marnivelo kaj portis medikamentojn kaj higienajn sciojn en tendojn de tieaj paŝtistoj kaj la zorgon de Prezidanto Maŭ en iliajn korojn. La paŝtistoj laŭdis ilin kiel “bonajn kuracistojn senditajn de Prezidanto Maŭ”.

## TRAIRI LA PROFUNDAJN MONTJOJN PRO LA POPOLO

Post veno al la stepo Banma, la taĉmento mobilizis la amasojn batali kontraŭ malnovaj kutimoj malutilaj al sano laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ kaj disvolvis laboron pri kuracado kaj preventado kontraŭ malsanoj. Portante kun si medikamentajn kestojn, vakcinojn kaj stetoskopojn, ili iris de tendo al tendo kaj de paŝtejo al paŝtejo por fari kuracadon al la komunumanoj de la tibeta nacio.

Foje, iu grupo de la taĉmento iris al Gejiĝaj-komunumo malproksima de sia rezidejo por servi tie al la komunumanoj. La grupanoj travadis Make-riveron, branĉan fonton de Jangzi-rivero kun fluo profunda ĝis ĉevaldorso, trapasis krutajojn kaj transgimpis du altajn, krutajn montojn laŭ mallarĝa zigzaga vojeto, kaj post du tagoj da peniga irado ili fine venis al la destinita loko.

Tie la paŝtistoj loĝas tre dise, oni ofte devas piediri tutan tagon por trovi unu tendon. Spite al laciĝo, la grupanoj ofte surgimpis montpinton tiutage kaj trairis profundan valon alitage por propagandi al la paŝtistoj la revolucian higienan linion de Prezidanto Maŭ. Per projekciado de lumbildoj, vizitado de pacientoj k. a. rimedoj, ili propagandis higienajn sciojn, faris vakcinadon al ĉiuj kaj zorgeme kuracis malsanulojn. Dank’ al ilia penado nemalmultaj malsanaj paŝtistoj resaniĝis kaj ĝoje reiris sur sian produktan postenon.

Ĉie persistante pri la principo de prevento de malsanoj kiel la ĉefa metodo kaj kombino de prevento kun kuracado, la taĉmento klarigis al paŝtistoj pri kaŭzoj kaj kuracaj kaj preventaj metodoj de malsanoj dum kuracado, tiel ke multaj forigis siajn malnovajn kutimojn malutilajn al sano kaj multe reduktiĝis la pocentoj de malsaniĝo. Krome, ili ankaŭ mane tenante manojn instruis al paŝtistoj teknikojn de injektado, kuracado kaj preventado, kaj elkulturis nombron da “nudpiedaj kuracistoj”, tiel ke multe ŝanĝiĝis la higiena fizionomio de la stepo.

## SAVI INTIMULON KUN PROFUNDA AMO

En frua vintro de 1969, venis raporto pri hiperkrizo de la malsano de Simaŭ, komunumanino de tibeta nacio de Juegin-komunumo sur la stepo Duogongma. Kiam kuracaj taĉmentanoj venis rapide al ŝia tendo, ŝi jam perdis la konscion. Post urĝa ekzameno, ili konkludis, ke ŝi suferas de akra apendicito kaj operacio devas esti tuj farota. Amputo de apendico estas propre simpla operacio, sed tre malfacila ĝi fariĝis pro manko de ekipaĵo kaj ĥirurgiaj instrumentoj. Ĉiuj paŝtistoj maltrankviliĝis pro sia klasa fratino. La taĉmentanoj firme esprimis, ke ili nepre savos ŝian vivon per



ĉiuj rimedoj. En malgranda tendo, ili propramane faris simplan operacian tablon kaj sukcese faris la operacion.

Post la operacio falis sinsekve neĝegoj kaj la vetero fariĝis eksterordinare frosta. La taĉmentanoj portis Simaŭ en sian tendon kaj tie ili laŭvice sidis apud ŝi, donante zorgeman flegadon. Krome, ili ankaŭ prizorgis ŝiajn du infanojn kaj faris la tutan dommastrumadon ĝis kiam la pacientino plene resaniĝis. Emociite de tio, Simaŭ diris dankeme: “Mi nepre diligente studos verkojn de Prezidanto Maŭ kaj bone laboros por esprimi mian dankemon al Prezidanto Maŭ per praktika agado.”

### SERĈADO DE PACIENTOJ EN DENSAJ ARBAROJ SUR PROFUNDAJ MONTJOJ

Sur la stepo Banma, kelkaj paŝtistoj estis konsiderataj de ŝamano kiel “lepruloj” kaj forpelitaj en densan arbaron sur profundaj montoj.

Informiĝinte pri tio, la taĉmento profundigis en amasojn por fari pluan enketadon. Analizinte kune kun la amasoj la simptomojn de la malsanuloj, ili decidis trovi kaj kuraci tiujn “leprulojn”. Surgrimpante krutajn montojn kaj trairante densajn arbarojn, ili serĉis ĉie la malsanulojn. Post kelkaj tagoj, ili fine trovis unun post alia la gepaŝtistojn Gegianmu, Ĵilaŝida k. a. kiuj estis antaŭe rigardataj kiel “lepruloj”. Kiam la taĉmentanoj klarigis al ili sian intencon, ili ĉiuj emociite kriis: “Vivu Prezidanto Maŭ!” Al ili estis faritaj detalaj ekzamenoj, kaj fine montriĝis, ke ili ne estas lepruloj, sed suferantoj de haŭta malsano k. a. Dank’ al la zorgema kuracado de la taĉmentanoj, plejparto de la malsanuloj baldaŭ resaniĝis, reiris en la varman kolektivon, kaj vivas kaj laboras feliĉe kaj ĝoje. Gihoŭlida, paŝtistino konsiderita de la ŝamano kiel “leprulo”, diris kun senlima dankemo post sia resaniĝo: “Estas la kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ, kiu min savis!”

# Ja Tre Bona Estas la Kombiniĝo de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj

ĜENG GING

**A**KTIVE efektivigante la instrukcion de Prezidanto Maŭ, ke kuracistoj de la okcidenta medicino studu la ĉinan medicinon kaj la ĉina medicino estu kombinita kun la okcidenta, medicinaj laborantoj de iu hospitalo de la Kantona Trupo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo science sintenis al la ĉina kaj la okcidenta medicinoj, persistas ĉe la principo de utiligo de la avantaĝoj de ambaŭ medicinoj kaj atingis evidentajn sukcesojn en kuracado de ordinaraj kaj oftaj malsanoj. Ekzemple, por kuraci rompiĝon de longa osto en la pasinteco, kuracistoj de la okcidenta medicino devis fari operacion kaj apliki la metodon de

longtempa interna fiksado en granda parto, kaj ili emfazis tro multe “senmovan kuŝadon”. Kvankam oni povas kunkreskigi la rompitan oston tiamaniere, tamen la cirkulado de sango kaj la funkcio de la membro ne povas glate restariĝi kaj cetere la kuraco bezonas longan tempon. La ĉina medicino emfazas en tio la cirkuladon de la sango kaj neglektas ĝustan kunigon de la rompita osto, kio ofte sekvigas mallongiĝon de membro. La medicinaj laborantoj de tiu hospitalo rigardas la ĉinan kaj okcidentan medicinojn laŭ la vidpunkto de divido de unu en du kaj dialektike unuigis la ĉinan kaj okcidentan medicinojn, movadon kaj senmo-

vecon, parton kaj tuton, kaj internan kaj eksteran kaŭzon, dank' al sia praktiko, konado, denova praktiko kaj denova konado. Ili utiligis la avantaĝojn kaj venkis la mankojn de ambaŭ medicinoj aplikante fikstabuletojn de la ĉina terapio kaj la haŭttiradon de la okcidenta terapio kaj samtempe prenigante kaj kataplasmane ĉinajn medikamentojn. La kuracado de pli ol sepdek kazoj montris bonegan efikon kaj la meznombra tempo de kuracado mallongiĝis je triono kompare kun tiu de nura apliko de okcident-medicina aŭ ĉin-medicina metodo.

En la pasinteco, en kuracado de rompiĝo de femurosta kolo, ĥirurgo de la okcidenta medicino ĉefe uzis la metodon de operacio por reordigo, kiu malbone influas la sangon, malfavoras al disvolvo de la interna kaŭzo al rekuniĝo de rompita ostoj, kaj havas malbonan kuracefikon.

Kaj precipe ĉe maljunuloj, rompiĝo de femurosta kolo ofte kripligis la suferintojn. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke materiisma dialektiko "konsideras eksterajn kaŭzojn kiel la kondiĉon de ŝanĝo kaj internajn kaŭzojn kiel la bazon de ŝanĝo, kaj ke eksteraj kaŭzoj efikas nur pere de la internaj", la kuracistoj iom post iom konis la regulojn en kuraco de rompita femurosta kolo, tra kuracado per la okcidenta kaj ĉina medicinoj en kombino. Ĝis nun oni jam kuracis rompiĝojn de femurosta kolo ĉe 5 plenaĝuloj tute sukcese kaj senkriplige. La dekstra femurosta kolo de maljuna malriĉkampanino Onklino Han rompiĝis kaj serioze deviis. Kuracistoj faris al ŝi haŭttiradon en mallonga tempo, reĝustigis la difektitan membron kaj tenis la rompitan ostojn en normala pozicio. Samtempe ili prenigis kaj kataplasmis ŝin per ĉinaj medikamentoj, kaj kuraĝigis ŝin faradi limigitan movon por reguligi la energion de la tuta korpo kaj pliigi la resaniĝan povon. Kaj per kuracado de la okcidenta kaj ĉina medicinoj en kombino, ili tute resanigis ŝian dekstran gambon.

Dank' al kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj, oni faris multajn t. n. "nekuraceblajn" ordinarajn kaj oftajn malsanojn, kiaj paraliziĝo, surdmuto, kronika nefrito, doloro de talio kaj



*Aplikante la ĉinan kaj okcidentan medicinojn en kombino kaj ĉefe per ĉinaj tradiciaj drogoj kuracaj laborantoj de ĈPLA kaj de hospitalo en Ĉangde-Kiu Jekian, kies brogita areo okupis 91% de la korpo, i. a. la trigrada vundareo okupis 25%.*

gambo, kuraceblaj kaj tiel la kuraca arto povas pli bone servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Iu juna laboristo de la Kantona Paperfabriko suferis de kronika nefrito dum pli ol tri jaroj. Lia malsano estis tre grava kaj li vizitis la hospitalon por peti helpon. Post serioza studo, la medicinaj laborantoj plene utiligis la avantaĝojn de la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kuraco de nefrito. Post kuracado dum certa tempo, la edemo de la juna laboristo malaperis, ankaŭ la hidrotorako kaj hidroperitoneo malaperis kaj klinika resaniĝo estis atingita. La junulo diris tre emocie: "La kamaradoj ĈPLA-anoj kuracis mian malsanon, kiun burĝaraj 'aŭtoritatuloj' kaj 'famaj kuracistoj' nomis 'nekuracebla'. Ja tre bona estas la kombiniĝo de la ĉina kaj okcidenta medicinoj!"

La kuracado per la ĉina kaj okcidenta medicinoj en kombino estas tre efika, rapida kaj kun relative malmulta malbona influo, estas tre bonvena al la vastaj amasoj. La medicinaj laborantoj de tiu hospitalo esprimis, ke ili firme iros la vojon de kombino de la ĉina kaj okcidenta medicinoj por pli bone servi al la vastaj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj fari kontribuon en la kreado de nova terapio de la patrolando.



# Modela Pura Vilaĝo Kilo

**E**N Guangdong-provinco sin trovas modela pura vilaĝo — Kilo-vilaĝo. Kilo konsistas el 32 naturaj vilaĝetoj kaj nun ĝi formas produktan brigadon. Respondante al la alvoko de Prezidanto Maŭ “**mobiliziĝu por vivi higiene, malmultigi malsanojn kaj levi la nivelon de sano**”, la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj aliaj revoluciaj amasoj persiste disvolvas patriotan higienan movadon ekde 1952 kaj transformis la lokon, kie cirkulis epidemioj antaŭ la Liberiĝo, en novan socialisman vilaĝon, kie ĉiuj atentis pri higieno kaj fartas bone kaj prosperas revolucio kaj produkto.

## I

Kilo-brigado situas en arbara regiono de Nanling-montaro de nia lando. Antaŭ la Liberiĝo, la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj suferis profundan ekspluaton kaj subpremon de la bienularo, ilia vivo estis tre mizera kaj iliaj higienaj kondiĉoj estis tre malbonaj. Ili ĉiuj loĝis en kabanetoj konstruitaj el abiaj ŝeloj. Iam kabanojn ĉirkaŭis malpuraj fluoj kaj stagnaj lagetoj kaj la homoj loĝis kune kun brutoj en la samaj kabanoj. Tial svarmis muŝoj kaj kuloj, kaj disenterio, malario kaj tifo plagis ĉiujare kaj pli kaj pli serioze. Estas natura vilaĝeto nomata Laŭvuzi,

kiu havis en 1944 pli ol 70 loĝantojn, kiuj ĉiuj, krom du, preskaŭ mortis de turmentado de disenterio kaj malario. Dum disenteria plago en aŭtuno de 1947, en Tanggiadong-vilaĝeto mortis 24 knaboj de la malsano. La postvivantoj fariĝis skelete marasmaj kaj la laborfortoj estis multe reduktitaj. En 1937, Kilo-vilaĝo havis pli ol 600 loĝantojn, sed antaŭvespere de la Liberiĝo, restis el

*Kilo-brigado starigis higienan stacion.*



ili nur 511 personoj. Tiam la vilaĝo aspektis tre malprosperere.

## II

La amasoj de Kilo atendadis tage kaj nokte kaj fine venis al ili savanto Kompartio. En 1949 Kilo liberiĝis kaj finis sian historion plenan de sango kaj larmoj. De tiam la produkto disvolviĝas jaron post jaro kaj senĉese boniĝas la vivo de la popolo. Sed malsanoj ankoraŭ minacis la sanon de la vilaĝanoj kaj tiuj urĝe postulis ŝanĝi la postĝintan fizionomion de la higiena laboro.

Ĝuste tiam nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris la alvokon **“mobiliziĝu por vivi higiene, malmultigi malsanojn kaj levi la nivelon de sano”**. La alvoko treege stimulis la batalon de la popolo de Kilo kontraŭ malsanoj. En 1952, sub la gvido de la partia filio, la popolo de Kilo starigis gvidantan grupon de patriota higiena movado kun malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kiel kerno kaj partoprenatan de kadroj, milicanoj kaj higienaj laborantoj por gvidi la amasojn disvolvi patriotan higienan movadon.

Pro la humideco en la montregionoj de suda Ĉinio, kuloj, muŝoj, litcimoj kaj ratoj generas rapide kaj estas “kvar malutiloj” disportantaj malsanojn. Por ĝisfunde ekstermi ilin kaj elimini la fontojn de malsanoj, la unua patriota higiena movado de Kilo komenciĝis per purigo de la malpuraj lagetoj kaj haladzaj kanaletoj. En la komenco, tiu laboro iris glate de unu natura vilaĝeto al alia, sed kiam venis la vico al Laŭvuzi-vilaĝeto, la laboro estis haltigita. Ĉar kiam la amasoj komencis pleniĝi per tero malpuran lageton en tiu vilaĝo, klasaj malamikoj, kiuj ne volontis je sia fiasko, provis subfosi la movadon per la superstiĉo de malmultaj kampanoj, agitante: “Tiu ĉi lageto vivtenas la Dion de Litorino. Se oni plenigos ĝin, tiam ne estos akvo por oferi al la Dio kaj sekve estos katastrofo de sekeco.”

La partia filio kaj la gvidanta grupo de patriota higiena movado vidis, ke por ekstermi malsanojn, oni devas ne nur ekstermi la “kvar malutilojn”, sed ankaŭ eduki la amasojn, ke ili leviĝu por batali kontraŭ sia superstiĉo kaj la klasaj malamikoj, kiuj intencas subfosi patriotan higienan movadon de la amasoj. Do unuflanke ili disiris en la amasojn por fari propagandon kaj malkaŝi la subfosajn intrigojn de la klasaj malamikoj, kaj aliflanke ili gvidis la kampanojn fari eksperimentojn, por ke la

kampanoj vidu propraokule, ke la muŝoj kaj kuloj generiĝas en malpura akvo aŭ sur malpuraĵoj. Liberigite de la superstiĉo pri la Dio de Litorino, la amasoj mem konscie plenigis la malpuran lageton. De tiam multe reduktiĝis la kuloj, muŝoj kaj la malsanoj disenterio kaj malaro.

## III

La unua patriota higiena movado multe bonigis la higienan staton de Kilo, sed la tasko de preventado de malsanoj estas longdaŭra kaj por ĝia efektivigo oni devas eduki la amasojn al kutimiĝi al higiena vivo. En la malnova socio, la popolo de Kilo vivis en malsato kaj frosto kaj havis nenian eblecon por zorgi pri higieno. Pro longa vivado en malfaciloj kaj mizeroj, iom post iom formiĝis la malnova kutimo de malzorgo pri higieno. Por fari ŝanĝon, eĉ la plej bagatelan ŝanĝon al la malnovaj ideoj kaj kutimoj, oni devas fari obstinan batalon. Ni prenu la uzon de komunaj manĝbastonetoj (kromaj manĝbastonetoj por preni manĝaĵojn el komunaj pladoj) kiel ekzemplon: en la komenco iuj ne kutimis al tio kaj post nelonga uzo iuj jam ne plu volis ilin uzi pro ilia maloportuneco. Kaj iuj maljunuloj eĉ opiniis, ke komunaj manĝbastonetoj aperis pro tio, ke la junuloj malŝatas ilin pro ilia aĝeco kaj malsaniĝemo. En tia cirkonstanco, la partia filio kaj la gvidanta grupo de patriota higiena movado foje kaj refoje propagandis la instruon de Prezidanto Maŭ pri zorgado de higieno kaj faris klasan edukon al la amasoj komparante la novan socion kun la malnova por profundigi ilian amon al la nova socio. Post la altigo de sia konscio, la amasoj komprenis, ke atento pri higieno kaj prevento de malsanoj estas ideologia revolucio por ŝanĝo de malnovaj kutimoj kaj moroj, kaj ili konsciencie leviĝis por batali kontraŭ la malnovaj ne higienaj kutimoj. Nun ĉiuj familioj de la kampanoj uzas komunajn manĝbastonetojn dum manĝado, ĉiutage purigas la ĉirkaŭejon, ofte purigas stalojn kaj trinkas akvon nur filtritan. Krome, ili iris sur monton, dehakis arbojn, per tiuj konstruis stalojn por porkoj kaj bovoj kaj faris per siaj propraj manoj diversajn objektojn por higieno. Por iuj familioj, kiuj havis malmultajn laborfortojn, estis malfacile konstrui stalojn, do aliaj komunumanoj meminciate helpis ilin tion fari kun klasa frateco. Dank’ al penado de la komunumanoj, baldaŭ jam finkonstruiĝis bonorde vicoj da staloj.

Multaj el la simplaj kaj praktike oportunaj higienaj ekipaĵoj uzataj en la hejmoj de la komunu-



manoj de Kilo estas faritaj el lokaj materialoj per indiĝenaj metodoj. Tie instaligis sur fekaĵujo mekanika kovrilo, kiu povas leviĝi, kiam oni surpaŝas pedalon, kaj malleviĝi, kiam oni formovas la piedojn. Tia kovrilo, kreita de popolanoj de Kilo post multfoja plibonigo, povas malhelpi la generadon de muŝoj en fekaĵujo. Kaj krome, ili kreis ankaŭ dekelkajn aliajn higienajn ekipaĵojn, kia simpla bambua filtrilo, kaj ilin disvastigis inter la komunumanoj.

La popolo de Kilo persiste kondukis patriotan higienan movadon dum dekelkaj jaroj kaj ĝisfunde ŝanĝis la postigintan fizionomion de higieno de tiu montvilaĝo. Nun la "kvar malutiloj", kiuj danĝeris al la sano de la popolo, jam tute malaperis tie. La komunumanoj de Kilo jam vere efektivigis sian deziron dormi sen kulvualo en suda Ĉinio. Disenterio, malario kaj tifo, kiuj plagis en Kilo antaŭ la Liberiĝo, jam estas plene eliminitaj kaj ankaŭ aliaj ordinaraj malsanoj fariĝis maloftaj. Nun prospere kreskas la loĝantaro de la tuta vilaĝo.

Patriota higiena movado antaŭenpuŝas la prosperan disvolviĝon de la produktado. De la jaro

1953 ĝis 1968, Kilo forstigis pli ol 23,000 muojn da tero. La kvanto de ligno liverita de ĝi al la ŝtato en 1968 estis trioble pli multa ol tiu de 1953. La pomua produktokvanto de rizo duobliĝis en la periodo de 1957 ĝis 1967. Kun la disvolviĝo de la socialisma kolektiva ekonomio, la vivo de la vastaj amasoj de komunumanoj senĉese pliboniĝas kaj 90% el ili jam loĝas en novaj domoj. Antaŭ la Liberiĝo, plejparto de la vilaĝanoj estis analfabetoj, sed nun ĉiuj junuloj jam havas klarecon de supera elementa lernejo kaj dekoj el ili lernas en mezlernejo.

La vasta komunumano de Kilo estas ĉiam dankema al la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ pro sia liberiĝo kaj feliĉa vivo. Ili entuziasme kantas popolkanton verkitan de ili mem:

*La ruĝa sun' lumigis Kilo-monton.  
Kaj elradikis povron kaj malsano-fonton;  
Revolucias ni kun forta san' kaj ruĝa koro,  
Kaj Prezidanton Maŭ senfine danke laŭdos nia  
ĥoro.*

*Kuraca laboranto de ĈPLA kaj "nudpieda kuracisto" faras imunigan injektadon al lernantoj.*



# Ŝanĝiĝo en Lernejo por Surdmutuloj

*Sub la brilo de la granda Maŭzedongpenso kaj dank' al la hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, profunda ŝanĝiĝo okazis en la Pekina Tria Lernejo por Surdmutuloj.*

*Per Maŭzedongpenso la laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso tie laboranta malfermis la "malpermesitan lokon" de surdmutaj akupunkturaj stimulpunktoj kaj gvidis la vastajn amasojn de la revoluciaj instruistoj kaj lernantoj krei tute novan metodon de unuiĝo de kuracado kaj instruado, nome dum instruado instruistoj faras ankaŭ kuracadon al la lernantoj. Surdmutuloj, kies malsanoj antaŭe estis rigardataj kiel nekuraceblaj, nun akiris sanon kaj fariĝis kleraj laborantoj kun socialisma konscio. Inter la lernantoj 280 jam povas krei "Vivu Prezidanto Maŭ!", 180 povas kanti, kaj multaj povas deklami la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ, kaj nemalmultaj jam suriris laborpostenojn laŭ alvoko de la Patrio, dediĉante sian forton al la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado.*


*En kunveno pri viva studo kaj viva apliko de la "tri popularaj artikoloj"*







*Kamarado Fu Ĝanĵuj, kiu vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson en pena remulo de sia subjektiva mondo post sia fikslöĝigo en brigado, ricevis laŭdojn de la vastaj amasoj de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.*



*Kamaradino de la propaganda taĉmento faras akupunkturon al surdmuta lernanto.*

*“Dank’ al nia amata Prezidanto Maŭ, ni surdmutuloj hodiaŭ ekparolas” —lernantoj ĝoje prikantas Prezidanton Maŭ.*







*Jen resanigita lernanto telefonas al siaj gepatroj sian rikolton en viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.*



*Por pliapaŝe kombini la kuracadon kun la instruado kamaradoj de la ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso organizis kurson de unuiĝo de kuracado kaj instruado.*



# Mi Rekunigis Rompitajn Fingrojn per Drogherboj

**M**I estas kuracisto de la hospitalo de Ĝong-hin-komunumo de Guangdong-provinco. De tri jaroj mi faris laboron pri rekunigo de rompitaĵoj per drogherboj kaj ricevis rimarkindan efikon. En kuracado al 13 pacientoj de fingrorompigo, mi resanigis 11 kaj ĉe la du aliaj montriĝis bona efiko.

Mia laboro estis farata sub la gvidado de penso de Prezidanto Maŭ pri “de praktiko al kono kaj de kono al praktiko”.

Iun tagon antaŭ tri jaroj, komunumano-malriĉkampano venis al la hospitalo por ke ni rekunigu lian rompitan fingron. Tiam, ni trovis nin senrimedaj por lin helpi, ĉar ne estis “efika medikamento”, ni faris al li nur seninfektigon kaj tiel forsendis lin. Post tio mi pensis, ke laŭdire drogherboj estas trezoro kaj povas kuraci multajn malsanojn, ĉu tiuj povas ankaŭ rekunigi rompitaĵojn. Sed ĉe tio alia penso venis al mi: mi ne vizitis medicinan lernejon. Kiel mi povus esti kompetenta en tio sen fundamenta scio kaj sperto? Poste, iu komunumano-malriĉkampano iam suferinta je fingrorompigo diris al mi, ke vojo formiĝas de paŝado de homoj, se oni kuraĝas praktiki, ili certe rikoltos sukceson. Sub stimulo de la maljuna malriĉkampano mi ripetade studis la instruon de Prezidanto Maŭ: “**Se vi volas akiri scion, vi devas partopreni la praktikon ŝanĝi la realon.**” Dank’ al tio, mi ekkonis plie, ke nur se ni kuraĝas agi, lernas en agado, agas en lernado kaj konstante praktikas, ni certe akiros sperton en la praktikado. Mi montriĝis timema antaŭ malfaciloj kaj ne kuraĝis agi ĉefe pro tio, ke mi ne partoprenis praktikon.

En rekunigo de rompitaĵoj oni devas kapti unue ŝlosilan punkton. Laŭ mia sperto en kuraca praktiko, mi opiniis, ke por rapide rekunigi la ostojn, karnon, nervojn de rompita fingro estas necese unue restarigi kaj akceli ĝian sangecirkuladon por ke ĝi akiru sufiĉan nutron, rapide eli-

minu malfreŝaĵojn kaj evitiĝu nekrozo de histoj. Tial, estas necese serĉi antaŭ ĉio drogherbojn utilajn al revivigo kaj akcelo de sangecirkulado. Mi profundiĝis en amasojn, kolektis dekelkajn efikajn receptojn kiuj kuracas kontuzojn kaj tranĉvundon, restarigas sangecirkuladon kaj kreskigas karnon, kaj elektis el ili kelkajn drogherbojn por rekunigi rompitaĵojn.

Unue, mi faris eksperimenton ĉe hundo, sed malsukcesis. Mi estis deprimita kaj ne volis fari plu tian eksperimenton. Sed poste mi pensis, ke fari eksperimenton ne estas por individua profito, sed por efektivigo de la granda strategia principo de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**”, tial mi serioze analizis la tutan procedon de la eksperimento, trovis la kialon de la malsukceso, daŭrigis la eksperimenton kaj akiris unuapaŝan sukceson.

Iufoje, la montra fingro de la dekstra mano de kamarado de la traktora stacio de Ĝonghin-komunumo estis rompita de traktora maŝinpeco kaj estis ligita nur per iom da haŭto. Mi rapide seninfektigis la vundon kaj ĝuste rekunmetis la rompitaĵojn de la fingro, ŝmiris ĝin per drogherbaĵo kaj bandaĝis kaj faris pri ĝi detalan observadon ĉiutage. Post kvin fojoj de ŝmirado en dek tagoj la rompita fingro jam estis sukcese rekunigita. Pere de la klinika eksperimento mi trovis kaj pruvis la efikon de la drogherboj por sukcesa rekunigo de rompitaĵoj. Sed laŭ la vidpunkto pri divido de unu en du mi trovis ke tiu recepto havas mankojn. Ekzemple, ĉar la karno ĉe la kunigita loko kreskis tro rapide, post rekunigo de la rompita fingro formiĝis karnoringo kiu malhelpas movon de la fingro. Por solvi la problemon, mi profundiĝis en kelkajn brigadojn, modeste petis konsilojn de veteranaĵoj, kiuj havas sperton pri uzado de drogherboj, kaj resumis sperton kune kun la amasoj. Post ripetada eksperimento en pli ol tri monatoj la recepto pli kaj pli perfektigis.

# La Spirito de N. Bethune

## Lin Rejunigis

—Pri Vang Kanggiu, kadro sendita al baza unuo por partopreno de fizika laboro

**V**ANG Kanggiu estis vicestro de la Higiena Buroo de Pekino. Li estas veterana medicina laboranto provita en militaj jaroj. En la periodo de 1938 ĝis 1939, kiam li laboris en la Limregiono de Ŝanhi, Ĉahar kaj Hebej, li propraokule vidis, kiel fervore kamarado Norman Bethune kuracis batalantojn. Kiam kamarado N. Bethune mortis, Vang Kanggiu devis iri al la fronto kaj li solene ĵuris antaŭ la korpo de kamarado N. Bethune, ke li nepre fariĝos bona kuracisto, tutkore kaj tutanime servanta al la popolo, kaj avangarda batalanto senlime fidela al la revolucia afero de la proletaro. Sed veninte en grandan urbon post la venko, en Vang Kanggiu kreskis tagon post tago la avido al ĝuoj kaj plezuroj kaj malinklino al plua malfacila vivo. La Granda Proletara Kultura Revolucio sonorigis alarmon al Vang Kanggiu, kaj li decidis iri la vojon de la militaj jaroj enradikiĝi en la kamparo kaj en baza unuo.

En la somero de 1969, Vang Kanggiu venis al Jencun-brigado de Ĉanggoŭ-komunumo de Fangŝan-gubernio en la antaŭurbo de Pekino por partopreni fizikan laboron tie. En la komenco post sia alveno, Vang Kanggiu pensis: Ĉifoje, dum mia partopreno de fizika laboro en bazunuo, mi nepre forlasos mian sinjorecan sintenon kaj sintenos kiel vera terkulturisto. Dum sia laborado, li intence demetis siajn okulvitrojn. Sed li estis kaj miopa kaj astigmatika. Formetinte la okulvitrojn, li malfacile distingis grenplantojn de herbaĉoj kaj dum sarkado li forsarkis maizplantojn kaj restigis herbaĉojn. Diveninte lian penson, iu maljuna malriĉkampano diris al li: “Maljuna Vang, en partopreno de fizika laboro, ne gravas, ĉu vi portas okulvitrojn aŭ ne, sed esence gravas tio, ĉu vi estas

por aŭ kontraŭ ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.” Tiuj vortoj ĵetis al liaj vangoj varmon. Li pensis, ke por li la maljuna malriĉkampano vere estas bona instruisto, kiu povas tiel facile kapti lian vivan penson. Demeti la okulvitrojn ja ne signifas forlasi la sinjorecan teniĝon; por forlasi sinjorecan sintenon, oni nepre devas eksplodigi revolucion en fundo de sia animo.

Foje, kiam Vang Kanggiu sterkis tomatplantojn en legomĝardeno, li hezitis starante antaŭ amaso da fekaĵ-sterko kaj poste li prenis ŝovelilon kaj malrapide disŝutis la sterkaĵon en la sulkojn de tomataj bedoj. La komunumano, kiu faris sulkon, jam malproksime antaŭen iris kaj la postiranta komunumano formanta bedojn jam atingis lin, li tamen ĉiam postrestis. Tion vidinte, iu maljuna malriĉkampano refaldis siajn manikojn kaj komencis disŝuti sterkon en la sulkon per siaj manoj, rapide kaj lerte. La ago de tiu maljuna malriĉkampano tuŝis lian animon tiel, ke li ekmemoris multajn pasintaĵojn:

Li naskiĝis en familio de malsupera mezkampano. En sia knabeco, li ofte kolektis sterkaĵon en la kamparo kaj neniam abomenis tian malpuraĵon. En sia 17-jara aĝo li aliĝis al la Okavoja Armeo kaj kiam li partoprenis produktan laboron en la armeo dum la malfacilaj militaj jaroj, li disŝutis fekaĵ-sterkon per la manoj. Kial lia sinteno al fekaĵ-sterko tiel multe ŝanĝiĝis post eniro en urbon? Post pripensado li konis, ke lia sinteno ŝanĝiĝis pro la venenado de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, kaj li malproksimiĝis de la laboranta popolo.



De tiam, li pretigis al si korbon kaj forkon kaj ofte iris al ĉirkaŭejoj de la vilaĝo por kolekti fekaĵon. Depost tiam, li ĉiam konkure prenas sur sin laborojn pezajn kaj malpurajn. Foje, la brigado asignis al fortuloj pezan laboron de purigo de porkstaloj kaj lasis lin selekti terpomojn kune kun virinoj, konsiderante pri lia aĝo de 50 jaroj. Sed li pensis, ke purigo de stalo ĝuste estas bona ŝanco por hardi lin, sekve li saltis en la stalon kune kun la junaj komunumanoj kaj ekŝovelis.

Kiam Vang Kanggiu venis al baza unuo por partopreno de fizika laboro, li firme decidis, ke li nur bone faros fizikan laboron kaj kiel eble plej malmulte okupiĝos pri aliaj aferoj, precipe pri kuracaj aferoj, kiuj povos malkaŝi lian profesion de kuracisto kaj alporti ĝenojn pro kuracado al komunumanoj.

Iutage, la emeritiĝinta ŝaktisto Ĉen Guj, kiu uzis kun li saman masonitan liton, malsaniĝis je akuta pneŭmonio. Li ekfebris kaj tusadis terure. Kion devas fari komunisto-kuracisto sin trovanta antaŭ tia malsanulo? Ĉu lin helpi aŭ ne? Komenciĝis batalo en la penso de Vang Kanggiu. En la komenco li pensis, ke li venas por partopreni fizikan laboron sed ne kuracan trupon, kaj cetere, la apoteko de la brigado ne havas ĉiujn necesajn medikamentojn, se li sukcesos en la kuraco, tiam la afero finiĝos feliĉe, tamen se li malsukcesos, li devos respondeci pri tio. Tamen li pensis poste, ĉu li devas stari senfare kaj lasi sian klasfraton suferadi la turmenton?

Tiam la alta figuro de kamarado N. Bethune denove aperis antaŭ la okuloj de Vang Kanggiu. Li pensis: Hodiaŭ mi hezitas, ĉu mi kuracos

*Kamarado Vang Kanggiu (la maldekstra) korverŝe priparolas sian komprenon en akceptado de reeduko fare de malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.*



klasfraton suferantan de malsano aŭ ne. Kion tio signifas? Ĉu tio ne estas ĝuste sinteno de tiaj homoj kritikitaj de Prezidanto Maŭ en lia brila verko *Memore al Norman Bethune*, kiuj “antaŭ ĉiu afero, ... unue kalkulas por si mem kaj poste por la aliaj”, “kaj al kamaradoj kaj la popolo, anstataŭ esti plenkore varmaj, ... estas malvarmakoraj, indiferentaj kaj sensentaj”?

Tiel pensante, Vang Kanggiu tuj kuris al la kuracejo de la brigado, alprenis injektaĵon kaj injektilon por kuraci la maljunan ŝaktiston. Vang Kanggiu zorge injektis al la maljuna ŝaktisto, kaj post kelktaga flegado kaj apliko de akupunktura terapio, la maljuna ŝaktisto rapide resaniĝis.

Tuj post kiam disvastiĝis la novaĵo pri tio, ke Vang Kanggiu resanigis la maljunan ŝaktiston, multaj malsanuloj vizitis lin por peti helpon, kaj kelkfoje la nombro de malsanuloj vizitantaj en vespero atingis pli ol dek, kaj li kuracis ilin ĉiujn kun fervoro. Li diris, ke per kuraco al malsanaj klasfratoj li ne nur povas mildigi ilian suferon, sed ankaŭ transdoni la zorgon de Prezidanto Maŭ al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj esprimi sian fidelecon al Prezidanto Maŭ.

Prezidanto Maŭ instruas al ni: “Sendi la vastajn amasojn de kadroj al fizika laboro estas tre bona ŝanco de denova lernado por la kadroj, ĉiuj kadroj devas tiel agi, escepte de la maljunaj, malfortaj, malsanaj kaj kriplaj.” Utiligante la bonan ŝancon de sia partopreno de fizika laboro, Vang Kanggiu lernadas de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj senĉese plifortigas sian memfidon kaj decidon por daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo.

Foje, kiam Vang Kanggiu sukcese kuracis reŭmatismen de malriĉkamparanino Onklino Ŝaŭ kun la aĝo de pli ol 60 jaroj, ŝi laŭdis, ke Vang Kanggiu estas “bona kuracisto alsendita de Prezidanto Maŭ”, kaj rakontis al li pri sia sperto de vizito al granda hospitalo en urbo. Ŝi diris, ke la kuracistoj, kies kapo plenas je burĝaraj pensoj, abomenis ŝian malpurecon kaj babilemon, ne faris zorgon esploron pri ŝia malsano kaj sekve ne povis kuraci ĝin.

“Tio ĉi estas krimo de la kontraŭrevolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki,” klarigis Vang Kanggiu. “Nun grandaj nombroj da kuracistoj venis al la kamparo sub la direkto de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ!”

“Ne nur la kuracistoj, sed ankaŭ la gvidantoj, kiuj direktas la higienan laboron, devas veni en la kamparon por partopreni fizikan laboron, alie ili fariĝos reviziistoj!”

Aŭdinte la vortojn de Onklino Ŝaŭ, Vang Kanggiu ruĝiĝis. Kiel forta akuzo kaj kiel profunda kritiko tio estas al la kontraŭrevolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio de Liu Ŝaŭki! Vang Kanggiu profunde sentis, ke ŝajne li resanigis la Onklinon, sed esence la Onklino malriĉkamparanino kuracis lian malsanon en penso.

La vortoj de Onklino Ŝaŭ rememorigis al Vang Kanggiu la pasintaĵon, kiel li faris revolucion kune kun la kunbatalantoj sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, vivis inter la popolamasoj, ofte fervore kuracis iliajn malsanojn kaj kiel la amasoj gardstaris, transportis informojn por ili kaj helpis ilin ŝirmi kaj transporti malsanulojn per brankardoj spite al morta danĝero. Tiam vere estis intemega rilato inter ili, kiel tiu inter fiŝoj kaj akvo aŭ inter sango kaj karno! Sed veninte en urbon, li formetis la stetoskopon, eklaboris en kabineto kaj iom post iom forgesis la bonan tradicion kaj bonan stilon de la revolucia higiena laboro en la revolucia bazloko, enviis la vivmanieron de la burĝaro, forgesis la laborantan popolon kaj devias de la proletara higiena linio de Prezidanto Maŭ.

Dank’ al sia veno al la kamparo por partopreno de fizika laboro, li propraorele aŭdis indignajn akuzojn de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj pri la kontraŭrevolucia reviziisma kuraca kaj higiena linio kaj propraokule vidis, ke sub la direkto de la revolucia kuraca kaj higiena linio de Prezidanto Maŭ, rapide kreskas nombro da “nudpiedaj kuracistoj”, kiuj amas la laborantan popolon kaj varme servas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj la sistemo de koopera kuracado montris grandan avantaĝon. Li forte emociiĝis. Li sentis, kvazaŭ li denove vivus en la jaroj de la revolucia milito kaj denove venus al li la revolucia juneco.

Nun, Vang Kanggiu partoprenas fizikan laboron, kaj samtempe kuracas malsanojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en kampoj, sur draŝejoj aŭ sur masonita lito, ĉiam portante kun si akupunkturajn pikilojn kaj medikamentojn. Kaj samtempe, li vaste kolektas popolajn kuracajn receptojn kaj drogherbojn kaj aktive helpas “nudpiedajn kuracistojn” bone plenumi sian laboron. Li estas tre bonvena al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



# Ĉina Kuraca Taĉmento en Somalio

**K**IAM la informo, ke parto de la ĉinaj kuracistoj laborantaj en Somalio baldaŭ revenos al sia patrolando, alvenis al la hospitalo "Martino" en la ĉefurbo de Somalio, la tieaj somaliaj kuracistoj, flegistinoj, laboristoj kaj pacientoj tion komunikis unu al alia, kaj multaj el ili kun larmaj okuloj adiaŭis ĉinajn amikojn kaj ripetade petis ilin kunporti la varman amikecon de la somalia popolo al la ĉina popolo kaj ĝiajn korajn salutojn al la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ.

Dum pli ol du jaroj, la konfido de la somalia popolo al la ĉina kuraca taĉmento kaj la sincera sento de varma amo al la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ ĉiam prezentigis kiel kuraĝiga forto por la ĉinaj kuracistoj. Ĉisube estas kelkaj emociaj aferoj.

## **MIA TUTA FAMILIO NENIAM FORGESOS PREZIDANTON MAŬ**

Aŝa, filino de Medina, estis tuj forlasonta la hospitalon, post sukcesa fortranĉo de rena tumor fare de ĉinaj kuracistoj. Tiun tagon, Medina estis aparte ĝoja kaj parolis pri sia kvarmembra familio kun ĉinaj amikoj.

Medina kies edzo jam forpasis, vivas kun unu filo kaj du filinoj. Antaŭ kelkaj jaroj, ŝia filo suferis de serioza malsano. Ŝi vendis sian nuran malgrandan parcelon de tero por kuracigi sian filon ĉe iu fremdlanda kuracisto. La mono estis finuzita, sed la malsano de la filo restis ne kuracita.

*La ĉina kuraca taĉmento laboranta en Somalio kuracas infanojn de la laboranta popolo de Afgoi.*



Antaŭ kelkaj monatoj, ŝia plijuna filino kun la aĝo de unu jaro kaj du monatoj, komencis vomi senĉese kaj ŝia ventro fariĝis pli kaj pli granda, tiel ke ŝi tute ne povis kuŝiĝi. Medina estis tre maltrankvila pensante, ke tiu filino eble ne povos eskapi de morto pro malriĉeco de la familio.

Kiam ŝi estis sciigita ke en la hospitalo "Martino" laboras ĉinaj kuracistoj, ŝi venis kun lasta espero al ili kun sia filineto por peti helpon. Post detala ekzameno, la lastaj diagnozis ke estas granda tumoro en la ventro de la infano. Pro premo de la tumoro al la abdomeno, la infano spiris malfacile kaj suferis de konstipeco kaj pneŭmonio. La malsano de Aŝa estis serioza. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ de "ekskluziva" kaj "senrezerva" servado al la popolo, la ĉinaj kuracistoj decidis fari operacion por savi la infanon.

La operacio iris glate. Kvankam la tumoro gluiĝis al intestoj kaj lieno, la ĉinaj kuracistoj senhezite kaj atente elprenis 2.7-kilograman tumoron el la ventro de la infano, kiu pezis nur 9.6 kg. Aŝa estis savita el la morto. Vidinte ke Aŝa iom post iom resaniĝas, Medina estis tre dankema en la koro. Ŝi diris: "Mi ne povas endormiĝi, ĉiam kiam mi ekpensas pri la feliĉo kiun havigis al mia tuta familio la ĉinaj kuracistoj senditaj de Prezidanto Maŭ. Prezidanto Maŭ, vi zorgas ne nur pri la ĉina popolo, sed ankaŭ pri la mizeraj popoloj de la tuta mondo! Mia tuta familio neniam forgesos vin!"

### ĈINAJ KURACISTOJ LIGIĜAS KUN NI KORON KUN KORO

"Mi kuŝis paraliza ok monatojn. En tiu tempo mi perdis ĉian esperon pri vivo. Sed la malespero estis senbaza, ĉar estas ĉinaj kuracistoj en la vasta mondo!" Tion diris somalia amiko Hassan en sia letero al la ĉinaj medicinaj laborantoj.

Hassan estas 24-jara junulo. Li estis serioze vundita en iu trafika akcidento, kio kaŭzis al li uretrorompigon. Iu fremdlanda kuracisto malzorge faris por li operacion. Anstataŭ kunigi la uretron li enigis kateteron en lian urinvezikon por ke la urino elfluu tra la katetero. Rezulte de tio, Hassan povis nek iri nek sidi kaj kuŝis sur la lito ok monatojn. Kiam li estis portita al la hospitalo "Martino", li jam estis skelete marmasma kaj suferis de grava uremio.

La sufero de tiu somalia junulo turmentis la ĉinajn kuracistojn. Ili refoje studis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ: "**Savi mortantojn kaj helpi vunditojn, efektiviĝi revolucian humanismon!**" kaj tuj komencis savi la pacienton.

Post unumonata atenta flegado kaj kuraco fare de la ĉinaj kuracistoj, la uremio estis forigita kaj la uretro estis kunigita. Hassan reakiris sian sanon.

Hassan estis tre kortuŝita, kiam li propraokule vidis kiel la ĉinaj kuracistoj studis kaj aplikis instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj kuracis lian lezon. Samtempe el sia kontakto kun la kuracistoj de du tute malsamaj specoj, li ekkomprenis la veron: Ĉiu ĥirurgo havas bisturion. La bisturion manipulas la ĥirurgo, kies agon direktas liaj pensoj. La plej grava armilo de la ĉinaj kuracistoj por savi mortantojn kaj helpi vunditojn ne estas bisturio sed Maŭzedongpenso. Nur la ĉinaj kuracistoj armitaj per Maŭzedongpenso povas efektiviĝi veran revolucian humanismon.

### AGI LAŬ LA "TRI POPULARAJ ARTIKOLOJ"

En Hargeisa, elektristo Abdi estis grave vundita en akcidento dum laboro, pro tio lia dekstra brako ne povis moviĝi kaj li ne povis kuŝi sur la dekstra flanko. Li vizitis multajn fremdlandajn kuracistojn en Hargeisa, kaj tiuj respondis ke "lia lezo estas nekuracebla". Sed kia turmento estas nemovebleco de la dekstra brako por laboristo!

Tiu somalia laboristo iam legis la "tri popularajn artikolojn" de Prezidanto Maŭ. La figuroj de Ĝang Side kaj Bethune profunde kortuŝis lin. Li pensis en si, ke estus bone, se li renkontus tiajn homojn kiaj laŭditaj de Prezidanto Maŭ. Poste, li informiĝis el radio ke ĉinaj kuracistoj laboras en la ĉefurbo de la lando, kaj lia koro tuj heliĝis. Li pensis ke la ĉinaj kuracistoj, kiuj estis edukitaj per la penso de Prezidanto Maŭ pri tutkora kaj tutanima servo al la popolo, certe donos al li helpon. Li decidis viziti ilin.

Venkinte diversajn malfacilojn kaj veturinte 1,300 km. dum sep tagoj, Abdi venis de Hargeisa al Mogadiŝo kaj finfine trovis la ĉinajn kuracistojn. Post detala ekzameno, ĉinaj kuracistoj decidis apliki al li miksan terapion de medikamento, masaĝo kaj akupunkturo. Post zorgema kuraco



# **Verkoj de Maŭ Zedong**

(en Esperanto)

**Pri Nova Demokratio**

**Paroladoj ĉe Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an**

**Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo**

**Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio  
de Ĉinio pri Propaganda Laboro**

*broŝurita*

**Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**

**Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo**

**P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

de pli ol du monatoj, Abdi reakiris la movkapablon de la dekstra brako. Kiam li forlasis la hospitalon, lia dekstra brako jam povas levi sitelon da akvo.

Dum la kuraco Abdi meminciate helpis ĉinajn kuracistojn akcepti pacientojn kaj fari kotonajn viŝbuletojn. Li diris: "Vi agas laŭ la 'tri po-

pularaj artikoloj', ankaŭ mi devas tiel agi!" Ĉe la forlaso de la hospitalo li refoje esprimis sian senliman admiron al la ĉinaj kuracistoj pro ilia spirito de ekstreme respondecema sento al la laboroj kaj ekstreme varma koro al la popolo. Levante sian resanigitan dekstran brakon li laŭte kriis "Vivu Prezidanto Maŭ!"

“红小兵”<sup>1</sup> 永红

“Hóngxiǎobīng” Yǒnghóng

(ruĝa eta gvardiano Jonghong)

## Ruĝa Gvardianeto Jonghong

永红今年十岁了。他是东风公社跃进  
Yǒnghóng jīnnián shí suì le. Tā shì Dōngfēng Gōngshè Yuèjìn  
(Jonghong ĉi jaro dek jaro jam li esti orienta vento komunumo antaŭensalto  
Jonghong ĉi-jare jam aĝas dek jarojn. Li estas ruĝa gvardianeto de la elementa lernejo

生产队小学的“红小兵”。他<sup>2</sup>爸爸、妈妈都  
Shēngchǎn-duì Xiǎoxué de “hóngxiǎobīng”. Tā bàba māma dōu  
produkta grupo eta lernejo de ruĝa eta gvardiano li patro patrino ĉiuj  
de Juejin Produkta Grupo de Dongfeng-komunumo. Liaj patro kaj patrino ambaŭ

在队里参加农业劳动，哥哥是公社机械厂的  
zài duì lǐ cānjiā nóngyè láodòng, gēge shì gōngshè jīxiè-chǎng de  
en grupo ... partopreni agrikulturo (laboro pliaĝa frato esti komunumo maŝin-fabriko de  
partoprenas agrikulturan laboron en la grupo, kaj la pliaĝa frato estas laboristo en la maŝinfabriko de

工人。家里还有一个小妹妹，由他<sup>2</sup>奶奶照看着。  
gōngrén. Jiālǐ háiyou yīgè xiǎo-mèimei, yóu tā nǎinai zhàokànzhe.  
laboristo hejme esti ankoraŭ unu eta fratino ... li avino prizorgi  
la komunumo. Hejme estas ankoraŭ malgranda fratino, kiun prizorgas lia avino.

永红在学校里热情学习和宣传毛泽东思想，  
Yǒnghóng zài xuéxiào lǐ rèqíng xuéxí hé xuānchuán Máo Zédōng sīxiǎng,  
Jonghong en lernejo ... fervore lerni kaj propagandi Maŭ Zedong penso  
En la lernejo, Jonghong fervore lernas kaj propagandas Maŭzedongpenson kaj serioze lernas

认真学习文化课；在农忙季节他积极参加农业  
rènzhēn xuéxí wénhuà kè; zài nóngmáng jìjié, tā jījī cānjiā nóngyè  
serioze lerni kulturo leciono en agrikulture okupata sezono li aktive partopreni agrikulturo  
kulturajn lecionojn; kaj dum agrikulture okupata sezono, li aktive partoprenas helpajn agrikulturajn

辅助劳动。大家都夸奖他是个<sup>3</sup>模范“红小兵”。  
fúzhú láodòng. Dàjiā dōu kuājiǎng tā shì gè mófán “hóngxiǎobīng”.  
helpi laboro oni ĉiuj laŭdi li esti ... modela ruĝa eta gvardiano)  
laborojn. Oni senescepte laŭdas lin kiel modelan ruĝan gvardianeton.

[Klarigo] En ĉiuj unuaj linioj estas ĉinaj ideografiaĵoj; en ĉiuj duaj linioj estas ties skribformo en la fonetika alfabeto; en ĉiuj triaj linioj estas signifoj de koncernaj vortoj en Esperanto; kaj en ĉiuj kvaraj linioj estas Esperanta traduko de la frazoj. Necesaj klarigoj por malfacilaj punktoj estas donataj sube:

1. “红小兵” estas avangarda organizo de elementaj lernejoj en Ĉinio.
2. 他(li) ĉi tie havas la signifon de 他的(lia). 的 ofte estas forlasita antaŭ vortoj, kiuj reprezentas parencojn. Sekve oni legas en la teksto 他爸爸(lia patro) kaj 他奶奶(lia avino) anstataŭ 他的爸爸 kaj 他的奶奶.
3. 个 estas unuonoma. Ĉi tie ĝi signifas “unu”.



# Heroa "Trupo de Okavojaj Armeanetoj"



La heroa Trupo de Okavojaj Armeanetoj marŝas sur la larĝa vojo.

En montvilaĝo de la regiono de Ĝenbaŭ-insulo de nia lando troviĝas ruĝgvardiana taĉmento, kiu estas honorita kiel heroo Trupo de Okavojaj Armeanetoj. La trupanetoj ĉiuj estas bonaj idoj de la laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. En la malnova socio, iliaj gepatroj multe suferis de la kruelaj ekspluatado kaj subpremado de la japana imperiismo kaj bienularo. De la infaneco jam radikiĝis en ilia animo la konscio pri la klasa sufero kaj la nacia malamo.

Sane kreskas la Trupo de Okavojaj Armeanetoj nutrate de la granda Maŭzedongpenso. Kvan-kam ili estas infanoj, tamen ili havas noblan ambicion. En la defendo de la patria landlima regiono, ili faris meritoplenajn kontribuojn por la patrio kaj popolo, starante ĉe la plejfronto de la kontraŭ-reviziisma batalo. Laŭ invito, ilia reprezentantino Lu Ĝihia ĉeestis la solenon de la 20-a datreveno de la Nacia Festo en la ĉefurbo kaj feliĉe akceptis la revuon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin. La heroo trupo plej varme ŝatas legi la verkojn de Prezidanto Maŭ, plej bone aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ kaj faris decidon fariĝi daŭrigantoj de la revolucia afero de la proletaro.



Gardstaro kontraŭ entrudigo de la malamiko






Neniam forgesante pri la klasa sufero kaj la nacia malamo, la heroa Trupo de Okavojaj Armeanetoj aktive disvolvas revolucion amasan kritikadon.



Lu Ĝihia (maldekstre) kun siaj kunlernantoj serioze aŭskultas lecionon.



La Trupo de Okavojaj Armeanetoj amas la Liberigan Armeon kaj lernas de ĝi. Jen la trupanetoj kaj PLA-ano kune studas *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong*.



# Malnova Fabriko sur Nova Vojo

**S**UB la brilo de la ĝenerala linio persone ellaborita de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “streĉi plene la energion kaj strebi forte antaŭen por konstrui socialismon multe, rapide, bone kaj ekonomie”, la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinejo de Ŝanhajo ĉiam persiste strebas al multeco, rapideco kaj ekonomieco en produktado kun bonkvaliteco kiel premiso kaj renovigis la fizionomion de la malnova ŝpinejo konstruita antaŭ pli ol 40 jaroj, ke ĝi kreis novan avangardan nivelon en produkto de fadeno por trikoto. En la jaro 1969, ĝi plenumis la ŝtatan planon je 49 tagoj antaŭ la fiksita dato. La po-hora mil-spindela produktokvanto kreskis je 22 procentoj kompare kun tiu antaŭ la granda kultura revolucio kaj ĉirkaŭ duoble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberigo. Ĝia produktopovo egalas al tiuj de tri same grandaj ŝpinejoj antaŭ 20 jaroj kune. Koncerne al la kvalito de ĝiaj produktaĵoj, la procentoj de ĝia ŝpinaĵo de la klaso Super-A 1 longe estas tenataj je pli ol 99.5 procentoj. Malaltiĝas jaron post jaro la konsumata kvanto de materialo kaj produktokosto.

## ĈIAM PLI BONE

La kvalito de produktaĵoj de la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinejo de Ŝanhajo ĉiam staras en la unua vico de tiu industria branĉo. Ĉu oni daŭre progresu aŭ memkontentiĝu en tia stato? En tio batalis du malsamaj pensoj. La vastaj amasoj de laboristoj, revoluciaj kadroj kaj teknikaj laborantoj persistis en la spirito de senĉesa revoluciado kaj ne kontentiĝis je atingo de la fiksita normo de la ŝtato. Ili starigis la sistemon de vizito al la klientoj por aŭskulti iliajn opiniojn kaj elmeti al si ankoraŭ pli altan postulon. Sed iuj opiniis: “La ŝtata normo fiksita por ni estas la klaso A 1, kaj ni jam longe tenadas ĝin, eĉ ĝin superis. Kion ni ankoraŭ povas fari pli apashe!” Iuj timis, ke vizito al la klientoj povas estigi “ĝenojn” kaj diris: “La fabrikoj kiuj uzas nian produktaĵon nombras pli ol 50. Kiel oni povas kontentigi la malsamajn postulojn de ili!”

Kiel oni devas sinteni al la kvalito de la produktaĵoj? Kiel oni devas sinteni al la postuloj de la klientoj-fabrikoj? La revolucia komitato de la

*Junaj laboristoj studas verkojn de Prezidanto Maŭ.*



ŝpinejo mobilizis la amasojn por koncentre diskuti tiujn problemojn. Dum la diskutado, ili restudis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Servu al la Popolo* kaj lian grandan instruon “ĉiuj produktaĵoj ne nur devas esti multaj en nombro, sed ankaŭ devas esti bonaj en kvalito kaj fortikaj en uzado”, kaj komprenis, ke altigo de la kvalito de la produktaĵoj estas bezonata de la afero “sinpreparu kontraŭ milito, sinpreparu kontraŭ naturaj katastrofoj kaj faru ĉion por la popolo”, kaj ke ĝi estas ne nur problemo ekonomia sed ankaŭ problemo politika. Oni devas pli kaj pli bonigi la produktaĵojn el la bezono de la tuta popolo.

Sekve, laŭ la postuloj de la klientoj-fabrikoj, tiu ŝpinejo starigis por si kvalitan normon de produktaĵo, kiu superis tiun fiksitan de la ŝtato, kaj plenergie strebis por servi al la popolo ekskluzive kaj senrezerve per fortika produktaĵo. Por plia-paŝe altigi la kvaliton de la produktaĵo kaj mastri la leĝon de ŝpinaĵo por trikado, la kamaradoj kolektantaj opiniojn vizitadas dekojn da klientoj-fabrikoj por fari enketadon monaton post monato kaj jaron post jaro; kaj krome oni instalas du trikmaŝinojn speciale por fari konkretajn analizojn kaj serĉi kaj krei novajn metodojn por altigo de la kvalito. La klientoj-fabrikoj laŭdis, ke ili “vere servas al la popolo tutkore kaj tutanime”.

#### POR MULTECO SUB LA PREMISO DE BONKVALITECO

La vastaj revoluciaj amasoj de la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinejo de Ŝanhajo kaj persistas ĉe alta

normo de kvalito kaj klopodas energie atingi altan nivelon en produktokvanto.

En la jaro 1958, la vastaj revoluciaj amasoj de tiu ŝpinejo rompis superstiĉojn, liberigis siajn pensojn kaj levis potencon antaŭensaltegon kun la spirito kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi. Ili duobligis la po-horan milspindelan produktokvanton de 18 kilogramoj antaŭ la Liberigo ĝis 36 kilogramoj. Tiam, iuj burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatoj” kriaĉis, ke “rapidigo de la maŝinoj malaltigos la kvaliton de la produktaĵo”. Sed la vastaj revoluciaj amasoj opiniis, ke bona kvalito kaj alta produktokvanto estas kontraŭaĵoj en unueco. Sen certa kvanto, ne povas esti kvalito; kaj sen laŭnorma kvalito, tiam kvanto perdas sian signifon. Oni estas vere respondecemaj al la popolo, nur se oni tenas altan kvaliton dum altrapida produktado. Ili persistis en ĉiufanka antaŭensaltego en alta produktokvanto, bona kvalito kaj malalta konsumo de materialo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj de tiu ŝpinejo forte kritikis la kontraŭ-revolucian reviziisman linion de funkciigo de fabrikoj, kiaj “administrado per specialistoj”, “sklaveco antaŭ fremduloj” kaj “rampismo”, interligis multecon kaj rapidecon kun bonkvaliteco kaj ekonomieco kaj pliiĝis la rapidecon de la maŝinoj kaj la produkton surbaze de stabila altigo de la kvalito de la produktaĵoj. Kiam la rapideco estis altigita ĝis certa grado, oni plia-paŝe altigis la kvaliton, kaj la produktado neniam restis senpro-

*Membro de la propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de ĈPLA en la ŝpinejo kore interbabilas kun novaj kaj veteranaj kadroj dum laborpaŭzo por akceli la ideologian revoluciigon.*





grese sur la atingita nivelo. En 1969, ili faris unu post alia 9 grandajn plibonigojn kaj altigis la produktokvanton de ŝpinmaŝino de 40.5 kilogramoj ĝis 48.5 kilogramoj. Ili rompis la rutinon de kutimaj malrapidigo de la maŝinoj kaj malaltigo de la produktokvanto en la varmega kaj pluvoza sezono! Ili skribis novan paĝon sur la historio de la ŝpinteksa industrio.

Por altigi la kvaliton de la produktaĵoj kaj ĉiuflanke efektiviĝi multecon, rapidecon, bonkvalitecon kaj ekonomiecon, ili energie kondukis amasan movadon de teknika renovigo kaj ĝustatempe aplikis novajn teknikojn laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ: **“Ni nepre devas rompi la rutinojn kaj plejble apliki progresintajn teknikojn.”** La komplika procedaro de la pasinteco estas jam multe simpligita kaj iuj postĝintaj teknologiaj aranĝoj estas anstataŭitaj per progresintaj.

Kiam la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinejo de Ŝanhajo renkontis kontraŭdiron inter produktokvanto kaj produktokvalito, ĝi ĉiam persistas en certigo de alta kvalito. Foje, subite difektiĝis la fridmaŝino de la karda laborejo kaj la temperaturo de la laborejo altiĝis. Kvankam la kardmaŝinoj ankoraŭ funkciis kiel antaŭe, tamen la randoj de la kotonreto difektiĝis, kio sekvigis malaltigon de la produktokvalito. Kion fari? Plejmulto de la kamaradoj opiniis, ke oni devas haltigi la maŝinon kaj ĝin refunkciigi nur post riparo de la fridmaŝino. Sed ankaŭ troviĝis iuj kiuj opiniis, ke “haltigo de la maŝinoj influas la produkton. Estas ne permesate ne plenumi la produktokvanton, dum iom malaltigo de la produktokvalito estas nenio.” La revolucia komitato de la ŝpinejo opiniis, ke tio koncerne al la grava demando, ĉu oni povas persisti en la bona tradicio de alta normo en kvalito, senhezite decidis haltigi la kardmaŝinon, mobilizis la amasojn urĝe ripari la fridmaŝinon kaj kaptis tiun ŝancon konduki ideologian edukon al la laboristoj kaj oficistoj. Fine la fridmaŝino estis rapide riparita kaj la breĉo en produktokvanto pro la laborĉeso estis rapide ŝtopita dank’ al la penado de la laboristoj. Kun profunda kompreno el sia sperto ili diris: “Oni povas vere efektiviĝi antaŭensaltecon en multeco, rapideco, bonkvaliteco kaj ekonomieco, nur se oni strebas al multeco, rapideco kaj ekonomieco kun bonkvaliteco kiel premiso.”

## PERFEKTIGO DE SISTEMOJ

Por ke la kvalito de la produktaĵoj longdaŭre kaj stabile altiĝu, la Kvina Ŝtata Koton-ŝpinejo de

Ŝanhajo altigis la konscion de la vastaj revoluciaj amasoj pri zorgado de la kvalito de la produktaĵoj, kaj samtempe kun tio serioze sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ **“reformu neraciajn regulojn kaj sistemojn”** kaj starigis kaj perfektigis regularojn kaj sistemojn utilajn al altigo de la kvalito de la produktaĵoj.

Elstarigo de la proletara politiko estas grava garantio por la ŝpinejo en efektivigo de ĉiuflanca antaŭensalteco de multeco, rapideco, bonkvaliteco kaj ekonomieco. Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, sub la influo de la nigraj varoj, kia “materia stimulo”, disvastigitaj de Liu Ŝaŭki, tiu ŝpinejo ĉiam kroĉiĝis al la rimedoj de puno kaj premio per poentoj en ĉiuj laboroj kaj tio helpis la disvolviĝon de burĝara ideologio. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, ĝi elstarigis la proletaran politikon, tiel ke ĉiu laboristo starigis en si la penson de ŝpinado por la revolucio kaj penadis por altigi la kvaliton de la produktaĵoj. Multaj raciaj regularoj kaj sistemoj estas konscience observataj, kio bone garantias la altigon de la kvalito de la produktaĵoj. La bonaj spertoj akumulitaj de la laboristoj dum longa praktikado utilaj al altigo de la kvalito de la produktaĵoj estas aprobitaj kaj pliapaŝe riĉigitaj kaj altigitaj. Ekzemple, koncerne al la sistemo de protektado kaj riparado de la ekipaĵoj, en la pasinteco oni aplikis la rimedon de punado per poentoj kaj premio per mono kaj sekve iuj zorgis nur pri tekniko kaj neglektis politikon, tial malakordo estiĝis inter la laboristoj. Ĉifoje, oni forigis ĉiujn tiujn reviziismajojn kaj perfektigis kaj altigis la sistemojn utilajn al la produktado kaj altigo de la kvalito de la produktaĵoj, kiaj tiuj de perioda riparado de ekipaĵoj kaj garantio de la normeco de la maŝinoj, kio pliapaŝe akcelis la ĉiuflanan antaŭensaltecon de altprodukteco, bonkvaliteco kaj malalteco de konsumo de materialo.

Dank’ al reformo de la neraciaj regularoj kaj sistemoj kaj starigo kaj perfektigo de raciaj regularoj kaj sistemoj, la produktado de la tuta ŝpinejo iras bonorde kaj la amasa movado de tenado de la revolucio kaj stimulado de la produkto progresas ne nur bole sed ankaŭ solide. Nun, se okazas kvalita difekto en trika fabriko, oni povas rapide trovi, kiu per kiu maŝino en kiu laborejo kaŭzis tion, kaj tuj fari plibonigon. Ĉar ili rigore persistas ĉe alta normo de la kvalito de la produktaĵoj, la ŝtato tre fidus iliajn produktaĵojn poreksportajn kaj ilin multe honoris.

# Fabriko Bonvena al Komunumanoj

**S**SEKVANTE la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**Preni agrikulturon kiel la bazon kaj industrion kiel la gvidan faktoron**”, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Fabriko de Maŝinoj kaj Elektraj Ekipaĵoj de Ŝunde-gubernio, Guangdong-provinco, persistas en servado al agrikultura produkto, atingis elstarajn sukcesojn en akcelado de agrikultura mekanikigo, disvolvado de agrikultura produkto kaj firmigo de la alianco inter la laboristaro kaj kamparanaro, kaj trovis laŭdon inter la vastaj amasoj de kamparaj komunumanoj.

En iu somero, kiam estis tempo de inundo, la fabriko ricevis telefonan peton de iu komunumo pri urĝa riparo al pumpiloj de drena kaj irigacia stacio uzataj por defluigo de la akvego. Respondeculoj de la fabriko tuj elsendis la veteranan laboriston Lu Ven kaj du junajn laboristojn por plenumi la taskon. La tri senditoj ekiris en pluvado travadante la kotan vojon kaj kunportante siajn instrumentojn. Sur la vojo ili vidis ke la plantidoj dronas en la akvego, kaj estis brule ĉagrenitaj, ke ili ne havas flugilojn por tuj atingi la drenan kaj irigacian stacion, kiu atendis helpon. Kiam ili fine venis al la loko, iliaj vestoj kaj instrumentoj estis tute tramalsekigitaj, kaj la komunumanoj en la stacio estis tre kortuŝitaj, ke ili venis tiel rapide. Sen ripozo la tri laboristoj tuj komencis riparadon, kaj en mallonga tempo la tri difektitaj pumpiloj ĉiuj jam refunkciis en la kontraŭinunda batalo.

En sia praktika servado al la agrikultura produkto la laboristoj de la fabriko trovis, ke ne eblas kontentigi la bezonojn de agrikultura produkto

per la rimedo, ke oni biciklas unuope al la kamparo por fari riparadon laŭ petoj. Por pli bone servi al la agrikultura produkto en Ŝunde, kie estas reto da riveroj, ili proponis elsendon de ripara boato por fari riparajn servojn rondirante en la kamparo. Ekde marto de 1967, unu ripara boato komencis konstante aktivadi en la plejfronto de subteno al agrikultura produkto.

La laboristoj ĉiam kolektas inter la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj opiniojn pri produkto kaj riparado de agrikulturaj maŝinoj kaj instrumentoj por senĉese plibonigi siajn laborojn. Foje kelkaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj diris al ili: “Ni nun havas pumpilojn. Estus tre bone, se ni povus posedi ian instrumenton, kiu povus akvumi la sukerkanajn kampojn en maniero de pluvado!” Tiu deziro starigis novan taskon por la laboristoj, tial la fabriko organizis specialan grupon por ĝin esplori kaj provprodukti. La afero ne prosperis post kelktempa klopodo. Iuj ekhezitis kaj volis iom atendi, ĉu iu alia fabriko povas ĝin elfari. Ĉu tion atendi de aliaj aŭ mem provi? Tio estis serioza ekzameno por ili. La laboristoj ripetade studis koncernajn instruojn de Prezidanto Maŭ, firmigis sian memfidon kaj plenforte sin ĵetis en la batalon por elfari “pluvmaŝinon”.

Ĝuste en tiu tempo, Fengĉengĝen-komunumo alsendis fajroestingan aŭton por ripari. El ties ŝprucigilo, la laboristoj ricevis sugeston, kaj post pli ol cent provoj dum pli ol 50 tagoj ili fine sukcesis elfari la “pluvmaŝinon” uzatan en pluvakvumado kaj irigaciado. Kiam ĝi estis uzata por pluve



akvumi la kampojn de morusarboj, sukerkanoj kaj legomoj, la komunumanoj ĝoje diris: “‘Pluvmaŝino’ ŝparas homan forton, servas kontraŭ sekeco kaj certigas al ni riĉrikolton.”

En la lastaj jaroj, la migranta ripara boato de la fabriko vizitis pli ol 90% de la produktaj grupoj de la tuta gubernio kaj riparis por ili pli ol 1,500 diversajn elektrajn maŝinojn, pli ol 2,100 pumpilojn, pli ol 500 transformatorojn kaj multajn aliajn agrikulturilojn. Kaj la fabriko fabrikis por la kamparaj komunumoj pli ol 4,300 pumpilojn, pli ol 12,700 elektrajn maŝinojn, 2,400 “pluvmaŝinojn” kaj pli ol 500 morteroenŝprucigajn pumpilojn uzatajn por digkonstruado. Tio laŭgrade mekanikigis la irigacion kaj drenadon por pli ol 200,000 muoj da kampoj de morusarboj, sukerkanoj kaj aliaj ekonomiaj plantoj, multe liberigis homajn fortojn kaj akcelis la disvolvadon de agrikultura produkto en la tuta gubernio.

Por pli bone disvolvi la efikon de agrikulturaj mekanikaĵoj, necesas armeo da teknikistoj tutkore kaj plenanime servantaj al agrikulturo, ĉar tute ne sufiĉis la ripara forto de la fabriko sola.

Iun tagon de somero de 1965, kelkaj komunumanoj ŝvite portis al la fabriko elektran motoron por peti riparon. Post ekzameno la laboristoj trovis ke nur du elektraĵoj fadenoj rompiĝis. Post kunligo la motoro tute bone ekfunkciis. Tiu

afero komprenigis al la revolucia komitato, laboristoj kaj oficistoj de la fabriko, ke necesas doni al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la teknikon de protekto kaj riparo de agrikulturaj mekanikaĵoj. La fabriko do fondis kursojn por kulturaj teknikajn fortojn por produktaj grupoj. La laboristoj pacience kaj detale transdonis sian sperton al la kursanoj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Por konkrete klarigi al la lernantoj la teorion de elektra motoro, la laboristoj mem faris simplajn modelojn, por ke la kursanoj pli rapide posedu la necesajn sciojn. Por helpi la lernantojn, la majstroj ofte foruzis siajn ripozajn horojn por doni suplementajn lecionojn, tiel ke la lernantoj pli bone plenumis sian taskon de lernado.

En la lastaj jaroj, la fabriko trejniis pli ol mil teknikajn laborantojn por popolkomunumoj, kiuj formis paŝon post paŝo trupon da teknikaj laborantoj sur agrikultura fronto de la gubernio. La komunumanoj diris: “Kamaradoj laboristoj ne nur fabrikas kaj riparas por ni agrikulturajn mekanikaĵojn, sed ankaŭ elkulturis por ni teknikajn laborantojn. Tio estas granda subteno de la laborista klaso al ni. Niaflanke ni nepre devas bone kulturi la kampojn por la revolucio kaj batalakiri riĉajn rikoltojn de grenoj, sukerkano kaj silkaj kokonoj por subteni la industrian konstruadon de la patrolando.”



## ĈUCAŬMI-HERBOMORTIGILO

### SUKCESE ELFARITA

Kun la revolucia spirito de sinapogo sur la propraj fortoj kaj pena luktado en malfaciloj, la revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Medikamenta Fabriko de Hjuanhua de Hebej-provinco sukcese provfaris Ĉucaŭmi-

herbomortigilon kaj komencis ĝin produkti pogrande.

Ĉucaŭmi-herbomortigilo estas tre efika substanco por ekstermi herbaĉojn en kampoj de rizo, tritiko, napo, brasiko k.a. sen malutilo al la agrokulturaj plantoj.

Dum sia partopreno de agrokultura laboro, revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la dirita fabriko persone spertis, ke granda kvanto da laborforto estas bezonata por neniigi herbaĉojn en kampoj. Por pli bone subteni la agrokulturajn produktojn, ili decidis fari per si mem ekipaĵojn el uzitaj materialoj por produkti Ĉucaŭmi-herbomortigilon. Post elfaro de necesaj ekipaĵoj, ili venkis diversajn teknikajn malfacilojn kaj fine elproduktis tian herbomortigilon post ripetada eksperimento.

# Giganta Ŝanĝo en Kvin Jaroj

—pri Guoĝuang-brigado

**S**UR Huajbej-ebenejo sin trovas avangarda kolek-tivo — Guoĝuang-brigado de Hiaŭhian-gubernio de Anhuj-provinco.

Post kvinjara penema luktado, en la brigado okazis giganta ŝanĝo dank' al sekvado de la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**” kaj persisto en la orientilo de “**sinapogo sur propraj fortoj**” kaj “**penema lukto en malfaciloj**”. Tie, Maŭzedongpenso profundigis en la koron de la komunumanoj tiel ke tute novigis ilia spirita fizionomio kaj impete disvolvigis la agrikultura produktado. Kompare kun la rekordaj produktaj kvantoj en 1964 antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la pomua produktokvanto de greno en 1969 kreskis de 126 ĝis 630 ĝinoj, kaj tiu de kotono de 31 ĝis 120 ĝinoj. Ekde 1966, la tuta brigado ne nur atingis plenan memprovizon de greno, sed ankaŭ liveris al la ŝtato grandan kvanton da superflua greno kaj kotono en la sinsekvaj jaroj. Samtempe kun tio, surbaze de plua plifortigo de la kolektiva ekonomio, ĝi pligrandigis la kolektivitan akumulon, kaj plie provizis sin per nombro da agrikulturaj maŝinoj inkluzive traktorojn. Nun, tiel en revolucio kiel en produkto ĉie en la brigado regas vigla prospereco.

Sed antaŭ kvin jaroj en Guoĝuang estis tute alia stato. En tiu produkta brigado kun pli ol 700 loĝantoj el pli ol 200 familioj, tiam el la pli ol 1,700 muoj da agro, kiujn ĝi posedis, pli ol 90 procentoj estis alkalaj. Sur la plej alkala grundo povis kreski nek plantoj nek herboj. Eĉ sur la plej bona grundo la pomua produktokvanto de greno en ordinara jaro ne superis 100 ĝinojn kaj tiu de kotono ne 20 ĝinojn. Pro malalteco de produktokvantoj, la vivo de la amaso estis kompare malfacila.

En oktobro de 1964 kamarado Guo Honggie estis transpostenigita de alia brigado al Guoĝuang-brigado kaj ekfunkciis kiel la sekretario de la brigada partia filio. Post sia alveno, li vizitis pli ol 70 familiojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj aŭskultis iliajn opiniojn kaj dezirojn kaj post tio li konkludis, ke la gvidanteco de la brigado ne estas vere tenata en la manoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.

Li komprenis, ke por gvidi la vastajn amasojn strikte sekvi Prezidanton Maŭ en revolucio kaj iri la vojon de Daĝaj, estas necese antaŭ ĉio solvi la problemon de gvida grupo. Kaj oni reelektis komitatanojn de la brigada partia filio kaj samtempe kun tio starigis novan gvidan grupon por la brigado havantan grandan revolucionan energion kaj intiman ligojn kun la amasoj.

Kiam la problemo de kadroj estis fundamente solvita, por levi la socialisman konscion de la vastaj amasoj, la brigada partia filio organizis amasan debaton pri la demando “Kien Iru Guoĝuang?” nome, ĉu ĝi iru la vojon de socialismo aŭ tiun de kapitalismo? En la debato, troviĝis kelkiuj, kiuj pledis por forlasi agrikulturon kaj entrepreni komercadon, aŭ por formigri de la loko, sintenante evitemaj antaŭ malfaciloj. Prenante la brilajn “tri popularajn artikolojn” kiel gvidilon kaj la heroan spiriton de la daĝaj-anoj sentime batali kontraŭ la naturo kiel ekzemplon, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj vaste disvolvis klasan edukon kaj refutis la diritajn erarajn opiniojn per ekzempligo de siaj propraj travivaĵoj. Ili montris, ke entrepreno de malgrandaj negocoj ne estas vojo de socialismo sed misvojo de kapitalismo, ĉar ĝi ne garantios kunan riĉigon al la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj elmigro estas forkuro de la malfaciloj, kaj tute ne konformas al la instruo de Prezidanto Maŭ. Ili firme diris: “Monto estas de homoj ekspluatita kaj vojo estas de homoj elhakita. Malfavoraj kondiĉoj de Guoĝuang estas nur ekstera fenomeno. Se nur ni sekvas la vortojn de Prezidanto Maŭ, apogas nin sur la propraj fortoj kaj peneme entreprenas nian aferon, ni certe konstruos Guoĝuang en novan socialisman vilaĝon.” Post ripetada diskutado, oni unuigis siajn pensojn kaj venis al konkludo ke iri la vojon “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**” estas la sola ĝusta vojo por ŝanĝi la postigintan fizionomion de Guoĝuang.

De longa tempo, la ĉefa natura malfavora kondiĉo, kiu malhelpis disvolviĝon de la produktado de la brigado, estis la alkala grundo. Inter la



pli ol 1,580 muoj da alkala tero, la aparte peza alkala tero okupis pli ol 220 muojn kun nigre griza surfaco, sur kiu eĉ herboj ne kreskas; la relative peza alkala tero okupis pli ol 600 muojn kun blanka surfaco, sur kiu nur ie povas kreski herboj; kaj la alia alkala tero okupis pli ol 700 muojn, sur kiu ie kun malpli peza alkaleco povas iom kreski plantoj sed aliloke ne. Por solvi la ĉefan kontraŭdiron en la produkta batalo kaj trovi metodon por reformi alkalan teron sur granda areo, la brigada partia filio organizis laborantojn fari esploradon pri ĉiuj alkalaj kampoj parcelo post parcelo kaj samtempe konsultis la veteranajn malriĉkamparanojn, kiuj havas sperton pri grundoreformo. Post esplorado kaj enketado, ia ideo ekformiĝis. Ĝi unue organizis siajn membrojn kaj kadrojn diskuti pri projekto de batalo kontraŭ alkalo kaj unuigis la pensojn. Kiam la plano estis publikigita, ĝi tuj vekis malsamajn resonojn. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ĝojigitaj kaj stimolitaj, esprimis sian firman subtenon. Ili diris: "Se la Malsaĝa Avo kapablis translokigi montojn, kaj Daĝaj kapablis reformi montojn, do ankaŭ ni kapablos reformi la alkalan grundon." "Penado en kelkaj jaroj kreas feliĉon por la senfina estonteco. Ni nepre ekagu!" Sed plenmano da klasaj malamikoj elpaŝis por ĝin senkrupule oponi. Iu kulaka elemento diris: "Se la sorto destinis al ni sep futojn, dek futojn ni ne atingos. Kiu estas destinita al mizero, al tiu riĉeco ne venos." Kaj li insultis la klopodon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por reformi la grundon, kiel idiotan revon de bufo deziranta manĝi cignon. Indignite, oni forte kritikis tiun aĉulon en amasa kunveno, tiel ke ankaŭ tiuj, kiuj antaŭe dubis pri eblo de grundoreformo, akiris siajn okulojn kaj plifortigis sian fidon.

En la komenco de 1965, la komunumanoj de la brigado komencis la laboron de grundoreformo. Ĉiuj viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj iris al kampoj kaj pene luktis tie tuttage. Ili forbalais la neĝon, enhakis la frostigitan teron kaj profunde fosis grundon. Kiam la surfaca alkala grundo estis forportita, la tero enkaviĝis, kaj la desube elfosita grundo estis ankoraŭ kruda. Kion fari? Prezidanto Maŭ diris: "**La amaso estas vera heroo.**" Post diskutado la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elpensis du rimedojn, nome: alporti sedimentan grundon el la kanalo Bejjunhe 5 liojn fora kaj malkonstrui la terlitojn en la vilaĝo por utiligi ilian fumaĵitan teron, kaj tuj ekagis. Oni uzis ĉiajn ĉarojn kaj vektojn por alporti sedimenton kaj fumaĵitan teron kaj kovri per ili la fositajn kampojn. Kiam la 64-jara malriĉkamparanino

Avino Liu Ŝihia forlasis la hejmon de sia bofilo 10 liojn foran, anstataŭ akcepti donacon prezentitan de sia filino ŝi portis kun si korbbon da grasa ruĝa tero por la reformita kampo de la kolektivo.

Ĝuste tiel la komunumanoj de la brigado per siaj ruĝa koro kaj laboremaj manoj venkis la obstaklojn kaj subfosadon de la klasaj malamikoj, laboregis en tri sinsekvaj vintroj kaj printempoj kaj akiris unu venkon post alia en la grunda reformo, sinapogante sur la propraj fortoj kaj peneme luk-tante en malfaciloj.

En lernado de Daĝaj por reformi la grundon, la brigado solvis la renkontitajn malfacilojn per siaj propraj fortoj. En 1965, la kotonajn kampojn sur la reformita tero atakis inundo kaj uragano. Post batalo kontraŭ la inundo kaj restarigado de la plantidoj, la kampoj urĝe bezonis aldonan sterkadon. Anstataŭ turni sin al la ŝtato por peti prunton, la komunumanoj mem investis pli ol 1,300 *yuan*, por aĉeti kemian sterkon, per kiu ili ĝustatempe sterkis la kotonplantojn, kaj tiel akiris bonan rikolton.



La disvolviĝo de la movado de la Granda Proletara Kultura Revolucio pluapaŝe altigis la konscion de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la brigado pri klasa batalo kaj batalo inter la du linioj. En la lastaj jaroj, konforme al la karakterizaĵoj de la produkto de sia brigado, ili ĉefe zorgis pri reformo de grundo, akvoutiligo, pliigo de sterko kaj elekto de bonaj specioj. Ili entute uzis pli ol 70,000 labortagojn por reformi la tutan alkalan areon kun amplekso de pli ol 1,500 muoj, tiel ke la antaŭe nekulturebla alkala tero turniĝis en fekundajn agrojn. Ili fosis diversajn kanaletojn kaj plenigis 8 terkavojn kaj konkavejojn kune ampleksantajn pli ol 500 muojn, kun totala laborkvanto de 180,000 kubmetroj da tero. Krome, sinapogante sur la propraj fortoj, ili konstruis 8 pumpilajn putojn kaj tiel solvis unuapaŝe la problemojn de irigacio kaj drenado. Por ŝanĝi la staton de malalta produkto, granda penado estis farita por sterko kaj speciala sterka grupo estis organizita por grandskale kolekti kaj fermentigi sterkaĵon. Krome, ili ankaŭ vaste aplikis sciencajn metodojn en terkulturado, starigis sciencajn kaj eksperimentajn grupojn kaj tiel fundamente efektivigis plibonigon de specioj de kotono, tritiko kaj sorgo. Por altigi la utiligitecon de la tero, ili komencis renovigi sian kultivan sistemon. Ĉio ĉi tio kreis pli favorajn kondiĉojn por granda disvolviĝo de la agrikultura produkto de la brigado. Ekde 1966, kreskis jaron post jaro la produktaj kvantoj de greno kaj kotono de la tuta brigado.

# Novaj Atingoj en Industrio de Ŝanhajo

*La Ŝanhaja Unua Fabriko de Kardita Litkovrilo kreis novan teknologion de blankigo de kotonfadenado per malvarma akvo kaj per tio renovigis la malnovan teknologion de blankigo per alttemperatura kaj altprema kuro aŭ vaporumo, kiun oni aplikis dum la pasintaj ĉ. cent jaroj en la teksaj kaj prestinkturaj entreprenoj, kaj tiel multe reduktis la kvanton de karbokonsumo, mallongigis la blankigan tempon je tri kvaronoj kaj samtempe akiris rimarkindan plibonigon en kvalito. Jen la renoviga grupo de triflanka kombiniĝo de la fabriko studas pri plia plibonigo de kvalito de produktajtoj.*




*Forg-ilmaŝina Fabriko de Ŝanhajo mem projektis kaj fabrikis grandan 4,000-tunan premmuldan maŝinon. Kun malgranda volumeno kaj simpla strukturo la maŝino havas altan efikon.*







La Kvara Termosa Fabriko kaj Riparejo de Maŝinoj por Emajlaĵoj de Ŝanhajo kreis novan teknologion de vakuigo de senvosta termoso kaj sukcese provfaris la unuan maŝinon en nia lando por senvosta termoso. Jen laboristoj kontrolas la kvaliton de termoso produktita per la nova maŝino.



La revoluciaj laboristoj kaj oficistoj en la sfero de la meĥanika elektra industrio de Ŝanhajo projektis kaj provfaris gigantan radio-drilmaŝinon. Peza je ĉ. 45 tunoj kun maksimuma drilkalibro de 120 mm. kaj progresinta strukturo ĝi estas plejparte movata elektre kaj hidraŭlike. Ĝi estas simple kaj facile manipulebla, funkcias stabile kaj multe konformas al la bezono de prilaboro de grandaj maŝinpecoj.





*La laboristoj de la Ŝanhaja Fabriko de Magneta Materialo "Hongŝeng" fabrikis diversajn novajn produktaĵojn de elektrona industrio. Jen ili kontrolas malgrandan precizan premformilon de ili fabrikitan.*

*La 6-transistora radioricevilo de tri diapazonoj projektita de la revoluciaj laboristoj de la Ŝanhaja Tria Radioaparata Fabriko speciale por la kamparo, jam estas grandnombre produktata. Kun alta sentemo kaj granda povo tia radioricevilo povas funkciigi 20 ĝis 30 magnetajn laŭparolilojn, tial ĝi konformas al uzado en montregionoj kaj regionoj kie ne estas elektro.*





# Relerno dum Fizika Laboro

## PLANTADO DE ARBOJ

En agrara reformo, mi laboris iutempe en vilaĝo Kingaj, Lankaŭ-gubernio. En vintro de 1962, kiam ekstreme akriĝis la klasbatalo en la kamparo, mi estis resendita al Kingaj por tie fiksloĝi kaj partopreni agrikulturan produktadon, kaj batali kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tiam mi korpe ekloĝis en la loko, sed pense ankoraŭ ne bone instaligis tie. Rimarkinte, ke mi ne estas tia, kia mi estis en la tempo de agrara reformo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre zorgis pri mi.

Iutage la maljuna malriĉkamparano Kin Ginvu, aktivulo dum la agrara reformo, kondukis min al la riverbordo. Kiam ni eksidis tie, li montris al mi la salikojn, kiujn ni plantis siatempe okaze de la venko de la agrara reformo, kaj diris: “Maljuna Ĝaŭ, iuj praktikas en la lastaj jaroj ‘tri pliigojn’ kaj ‘kvar liberojn’, tiel ke fiuloj faris subfosojn profitante la okazon. Vidu, kiel difektiĝas nun la salikoj! Mi tre ĉagreniĝas, kiam mi vidas ilin. Vi devas gvidi nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn batali kontraŭ ili!” Lia vorto vekis miajn rememorojn pri la bataloj dum la agrara reformo. En tiu tempo, kune kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, mi batalis por ekstermi banditojn kaj faligi la bienulojn. Mi neniam plendis, kvankam mi ĉiutage enlitiĝis post noktmezo kaj manĝis plej krudan manĝaĵon. Kial mi nun ne kontentas, kiam la Partio sendas min al la kamparo? Tio klare montras, ke en miaj okuloj ne plu estas loko por la malgrandaj kabanaj kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, pro leviĝo de mia pozicio, kaj ke la penso pri finplenumo de revolucio ekokupis mian kapon. Sed, ĉu vere jam estas plenumita la revolucio? “Vidu, kiel difektiĝas

nun la salikoj!” Ĉu tio ne estas manifestiĝo de klasbatalo en la kamparo? “Vi devas gvidi nin malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn batali kontraŭ ili!” Ĉu tio ne estas voko de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj stimulantaj min al daŭra revolucio?

Revenante de kampo-laboro, Maljuna Kin kunportis salikidon kaj plantis ĝin antaŭ mia loĝejo, dirante al mi sincere kaj emfaze: “Mi esperas, ke vi ĉifoje enradikiĝos ĉi tie kiel tiu arbeto por daŭre revolucii kun ni ĝis la fino, sekvante Prezidanton Maŭ.” En tiu punkto mi longe pensis, la komisiono de la Partio kaj la espero de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kirliĝis en mia kapo. Mi malfermis verkon de Prezidanto Maŭ, en kiu li instruas al ni: **“Ni komunistoj estas similaj al semoj kaj la popolo estas simila al la grundo. Kien ni iras, tie ni devas kombiniĝi kun la popolanoj, enradikiĝi kaj flori inter ili.”** Tuj plivastiĝis mia spirita horizonto. Mi faris firman decidon enradikiĝi en la kamparo la tutan vivon.

En la vintro de tiu jaro, kune kun la vasta komunumanaro mi frakasis la restaŭrajn agadojn de klasaj malamikoj kaj replantis dek mil poplojn kaj ruĝajn salikojn. Ankaŭ mi mem same kiel plantidoj enradikiĝis en la amasojn.

## SUGESTO RICEVITA EL SEMTREMPO

Post veno al la kamparo mi pensis en mi, ke ĉifoje la afero estas alia ol en la tempo de agrara reformo. Ĉar antaŭe mi portis la respondecon de gvidado, sed ĉifoje mi venis kiel simpla komunumano kaj sufiĉas, se mi bone laboras sur kampoj. Tial mi neniam ĉesis partopreni kampajn laborojn kaj pensis, ke tio trovos aprobon de la amasoj. Sed ekster la atendo, la fakto montriĝis aliel.

Foje mi faris semtrempon kun kelkaj komunumanoj. Subite iu el ili demandis min: "Diru, Maljuna Ĝaŭ, kial iuj semoj mergiĝis en la akvon, dum aliaj ne?" Mi respondis senpripense: "Ĉu ne pro tio, ke la mergiĝintaj estas plenaj, dum la flosantaj malplenaj?" Tiam la komunumano aldonis: "Ĉu ne estas same tiel kun homoj?" Tiu lia frazo pensigis min. Jes, ĉu ni kadroj kiuj venis al la kamparo por fikse loĝi, ne estas ĝuste same kiel semoj trempitaj en akvo? Ĉar mi flosas sur la amaso sed ne profundigis en ĝin, tiel ke mia penso estas tute malplena, kvankam mi troviĝas en okupateco, kaj **"la produktado de la amasoj, la interesoj de la amasoj, la spertoj kaj humoro de la amasoj"** estas ankoraŭ nebulaj por mi. Ĉu mi indas la nomon de komunisto en tia stato?

Mi refoje lernis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **"ni komunistoj ne celas fariĝi estroj, sed fari revolucion"** kaj ekkomprenis ke la kaŭzo de tio ke mi estis aktiva dum la agrara reformo, sed ne povas pense min instalita en la kamparo ĉifoje, estas la venena influo de la "teorio de aliĝo al kompartio por fariĝi estro" antaŭenpuŝita de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Nur per kompleta elimino de tiu influo el la kapo, mi povas firmi marŝi laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. De tiam mi ne nur staras kun la amasoj ŝultro-ĉe-ŝultre, sed ankaŭ vizitas komunumanojn dum neĝoblovaj tagoj por doni helpon al tiuj, kiuj estas en malfacileco. Mi laboras kune kun la komunumanoj kaj kore interbabilas kun ili dum laborpaŭzoj. Ankaŭ ili volentas interŝanĝi kun mi la pensojn, tiel ke mia penso ĉiam pli alproksimiĝas al tiu de la komunumanoj.

## KIE ESTAS LA FONTO?

Foje ni estis fosantaj pumpilan puton. Kiam ni fosis ĝis la profundeco de ĉirkaŭ 30 metroj, jam aperis fonto. Kiam la puto estis preta, ĝuste okazis sekego. Mi pensis ke la sekego ne influos la rikolton, ĉar granda estas la potenco de la puto. Sed ekster la atendo, nelonge post sia funkciado la puto elĉerpiĝis.

En tiuj tagoj la maljuna malriĉkampano Kin Jihjuan tuttage algluis sin al la puto. Jen li subiris al la putfundo por pririgardi, jen li supreniris kaj dronis en meditadon. Iutage, li kvazaŭ eltrovis ion kaj ĝoje diris al mi: "Maljuna Ĝaŭ, laŭ mia opinio, la tuta problemo troviĝas en tio, ke la puto

estas ne sufiĉe profunda. Antaŭe, kiam mi laboris kiel dungito ĉe bienulo, mi fosis puton kun profundeco de pli ol 40 metroj tra tavolo de tero el kalkecaj tuberoj, kaj el tiu puto la fonto neniam elĉerpiĝis. Mi konjektas, ke sub nia puto devus ankaŭ esti tavolo da tero el kalkecaj tuberoj, kiu baras la fonton." "Bone," mi diris, "ni do provu!" Kaj ni lernis kun la amasoj la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo* kaj decidis elfosi la fonton tra la tavolo de kalkecaj tuberoj.

Kiam ni fosis la teron ĝis profundeco de 40 metroj tra la tavolo de kalkecaj tuberoj, tuj ŝprucis la fonto. De tiam nia puto ne plu elĉerpiĝis en plej granda sekeco kaj ĝia akvo garantiis ĉiujaran riĉrikolton.

Kie estas la fonto? La fonto kiu akvumas la plantojn, troviĝas sub la tavolo de kalkecaj tuberoj, kaj la fonto, kiu nutras mian penson, troviĝas en la amaso. Se oni nur firme tenas en la koro la instruon de Prezidanto Maŭ kaj por ĉiam sincere agas kiel malgranda lernanto de la amaso, oni povas havigi al si la neelĉerpeblan fonton de saĝo kaj forto.

De kelkaj jaroj sub la reeduko de la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj, mia mondkoncepto estas en ŝanĝado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, mi estis elektita kiel ĉefkomitatano de Revolucia Komitato de la brigado, vicĉefkomitatano de R. K. de la komunumo kaj membro de R. K. de la gubernio. Kaj mi havis la honoron ĉeesti la 9-an Tutlandan Kongreson de la Partio kaj feliĉe vidis la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ.

Kiam ni rikoltis milion en la pasinta aŭtuno, la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj varme kuraĝigis min daŭre progresi kaj samtempe admonis min elkore por ke mi estu libera de fiero kaj malpacienco. La maljuna malriĉkampano Kin Joŭli diris al mi signifoplene: "Vidu, Maljuna Ĝaŭ! La spikoj, kiuj klinas sian kapon, portas grandajn grajnoj, dum kiuj portas malgrandajn, levas sian kapon supren. Vi ne devas esti fiera kaj memkontenta, sed klopodu akiri gloron por ni malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj kaj revolucii ĝis la fino sekvante Prezidanton Maŭ!"

Jes, sinklinantaj spikoj portas dikajn grajnoj. Mi nepre estos ĉiam modesta kaj singardema kaj floros kaj fruktos inter la malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj.



# Anna Louise Strong, Fama Usona Progresema Verkistino, Forpasis en Pekino



Anna Louise Strong, progresema usona verkistino, mortis de arterioskleroza kormalsano post longa kuracado, vespere de la 29-a de marto de 1970 je la aĝo de 84 jaroj.

Dum ŝia malsanado, Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, Guo Moĵo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kaj ankaŭ gekamaradoj kaj geamikoj el Usono kaj aliaj landoj, kiuj estas en Pekino, iris vidi ŝin en la hospitalo.

La 2-an de aprilo, adiaŭa ceremonio okazis ĉi tie por montri respekton al fama usona progresema verkistino Anna Louise Strong antaŭ ŝia portreto kaj cindro.

En la halo kie okazis la ceremonio pendis portreto de Anna Louise Strong kaj estis la urno entenanta ŝian cindron. Sur transversa rubando legiĝis la surskribo: "Vivu eterne Anna Louise Strong en nia memoro!"

Ambaŭflanke de la portreto de Anna Louise Strong staris girlandoj prezentitaj de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj lia intima kunbatalanto Vicprezidanto Lin Biaŭ. La blankaj silkaj rubandoj de la girlandoj portis jenan surskribon: "Al usona progresema verkistino fraŭlino Anna Louise Strong, amikino de la ĉina popolo". En la halo troviĝis ankaŭ girlando de kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Ĉen Boda, Kang Ŝeng kaj Giang King, girlando de kamarado Li Hiannian, girlando de kamarado Guo Moĵo, girlando de kamaradinoj Caj Ĉang, Deng Jingĉaŭ kaj Caŭ Jioŭ, girlando de kamarado Ŝi Ŝaŭhua kaj girlandoj de ĉiuj koncernaj institucioj.

Interalie girlandojn prezentis ankaŭ Pham Van Dong, ĉefministro de la Registaro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio, la ambasadorejo de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio en Ĉinio, la Naciliberiga Fronto de Suda Vjetnamio, Jusuf Adjitorop, ĉefo de la delegacio de la Centra Komitato de la Indonezia Komunista Partio, la Sekretariejo de la Afrika-Azia Ĵurnalista Asocio, la Plenuma Sekretariejo de la Konstanta Buroo de Afrika-Aziaj Verkistoj, cejlona ambasadoro al Ĉinio D. B. R. Gunawardena, kaj gekamaradoj kaj geamikoj el Usono kaj aliaj landoj en Pekino.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, vicĉefministro Li Hian-nian, Guo Moĵo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kaj kamaradino Deng Jingĉaŭ, membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, montris sian funebbron al Anna Louise Strong antaŭ ŝia portreto kaj cindro en tiu posttagmezo. Inter la pli ol 500 personoj kiuj adiaŭis ŝin estis respondecaj kamaradoj de koncernaj institucioj kaj revoluciaj popolanoj de Pekino.

Inter tiuj, kiuj partoprenis la ceremonion, ankaŭ estis Ngo Thuyen, ambasadoro de la Demokratia Respubliko de Vjetnamio al Ĉinio, Nguyen Van Quang, ambasadoro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al Ĉinio, kamarado Jusuf Adjitorop, D. B. R. Gunawardena, ambasadoro de Cejlono al Ĉinio, Djawoto, ĝenerala sekretario de la Afrika-Azia Ĵurnalista Asocio kaj aliaj membroj de la sekretariejo de Afrika-Azia Ĵurnalista Asocio, Kinkazu Saionĝi, portempa respondeculo de la Plenuma Sekretariejo de la Konstanta Buroo de Afrika-Aziaj Verkistoj kaj aliaj membroj

de la sekretariejo, kaj gekamaradoj kaj geamikoj el Usono kaj aliaj lanĉoj en Pekino, inkluzive de Frank Coe kaj Ruth Coe, Ma Hajde (George Hatem), Julian Schuman kaj Donna Schuman, Sol Adler kaj Patricia Adler kaj Rewi Alley.

Guo Moĵo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la Ĉina Akademio de Sciencoj, faris paroladon ĉe la ceremonio. Li diris: "Kamaradino Strong estis bona filino de la usona popolo kaj vera kaj fidela amikino de la ĉina popolo. Ŝi strebis al progreso dum sia tuta vivo kaj bone sciis kiun ami kaj kiun malami. Ŝi batalis kontraŭ imperiismo kaj reviziismo. Ŝi firme subtenis la noblan aferon de naciliberigo kaj socia emancipo de diverslandaj popoloj. Kaj ŝi faris grandajn klopodojn por pliigi la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj usona popoloj."

"De siaj fruaj jaroj," Guo Moĵo diris, "kamaradino Strong sin dediĉis al progresemaj sociaj aktivadoj. Ŝi aktive partoprenis oponadon kontraŭ la Unua Mondmilito, kiu estis lanĉita de imperiismo, kaj partoprenis la ĝeneralan strikon de Seattle kontraŭ monopola kapitalo en 1919."

Li daŭrigis: "En 1921, ŝi unuafoje iris al Sovetunio. Dum la sekvintaj pli ol dudek jaroj, ŝi faris multan laboron por informi al la usona popolo kaj la aliaj popoloj de la mondo pri la revolucio kaj konstruado en la socialisma Sovetunio sub la gvidado de Lenin kaj Stalin. Dum tiu periodo, ŝi ankaŭ vaste raportis pri la revoluciaj bataloj de la popoloj en aliaj partoj de la mondo."

Guo Moĵo diris: "Kamaradino Strong sesfoje vizitis Ĉinion. Ŝi havis senliman respekton al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Ŝiaj verkoj plenas je arda amo al Prezidanto Maŭ kaj firma konvinkigo pri la certa venko de la revolucia afero de la ĉina popolo. Kun profunda sento ŝi diris: 'Ĉinio estas tre feliĉa, havante Prezidanton Maŭ Zedong kun granda genio.'

"En 1925, kamaradino Strong unuafoje venis al Kantono kaj raportis pri kaj donis subtenon al la granda kaj fama striko en Hongkong. En 1927, ŝi iris profunde en la kamparojn de Hunan-provinco kaj tie vidis propraokule la furiozajn flamojn de la kamparana batalo kiujn persone bruligis Prezidanto Maŭ. Ŝi laŭdis la batalon kiel 'la potencon de la novaj fortoj leviĝantaj en Ĉinio inter laboristoj kaj kamparanoj' kaj akklamis ke 'la agoj de la kamparanoj estas bonaj kaj

raciaj'. Ŝi entuziasme antaŭdiris: 'Estos tiuj kamparanoj kaj laboristoj kiuj havos la kuraĝon porti sian landon el la feŭda epoko en la modernan mondon'.

"En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito kamaradino Strong faris du vizitojn al Ĉinio. Ŝi entuziasme raportis pri la heroa batalo de la popola armeo kontraŭ la malamiko sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj forte malkaŝis la krimojn de la reakcia kliko de Ĉiang Kajŝek en freneza opono kontraŭ la komunistoj kaj subfosado al la Kontraŭjapana Rezistmilito.

"En 1946, kamaradino Strong la kvinan fojon flugis al Ĉinio kaj vizitis Jan-an, la sanktejon de la revolucio, kaj aliajn liberigitajn regionojn. Dum tiu vizito Prezidanto Maŭ akceptis ŝin kaj publikigis la fame konatan tezon kun profunda historia signifo '**Ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj**'. Ŝi laŭdis tiun saĝan tezon de Prezidanto Maŭ kiel 'la grandan veron de nia nuna epoko' kiu 'lumigis la vojon de la mondaĵ eventoj.' "

"En 1958, venkinte multajn obstaklojn kaj malfacilojn, ŝi sesfoje venis al Ĉinio decideme je sia granda aĝo de 72 jaroj," diris Guo Moĵo. "Kun alta entuziasmo kaj per akra plumo ŝi raportis al legantoj tra la tuta mondo brilajn atingojn de Ĉinio en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado kaj propagandis la fakton, ke la ĉiamvenka Maŭzedongpenso profundigis en la korojn de la popolo. Ŝi prikantis la tri ruĝajn flagojn de nia lando, nome la ĝeneralan linion por konstruado de socialismo, la grandan antaŭensalton kaj la popolajn komunumojn; ŝi akklamis la novan renaskiĝon de la miliono da servutuloj en Tibeto; ŝi laŭdis la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio; kaj ŝi kondamnis la usonan imperiismon pro ĝia agreso kaj la sovetuniajn reviziistojn pro ilia perfido. Kaj samtempe, ŝi ĉiam zorgis pri la revoluciaj bataloj de la usona popolo kaj la subpremataj nacioj kaj popoloj."

Guo Moĵo deklaris: "La vivo de Anna Louise Strong estis glora vivo, batala vivo. Ŝia forpaso estas perdo ne nur por la usona popolo, sed ankaŭ por la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj."

"La nuna monda situacio estas bonega," montris Guo Moĵo. "La tagoj de la usona imperiismo, la sovetunia reviziismo kaj la reakciularoj de ĉiuj landoj fariĝas ĉiam pli malfacilaj. Certe alvenos la nova mondo, por kiu Anna Louise Strong batalis dum sia tuta vivo, la nova mondo kiu alportos emancipiĝon de la tuta homaro."



# Heroa Monturbo

## Gjirokastra

**N**I ekveturis orienten per aŭtomobilo de la grava apudmara urbo Saranda en la suda Albanio, traveturis smeralde verdajn oranĝarbarojn de Delvina, ĉirkaŭveturis la kontinuan Gjere-monton laŭ la ŝoseo simila al ŝvebanta rubando kaj alvenis al la monturbo Gjirokastra ĉe la limo inter Albanio kaj Grekio.

La aŭtomobilo flugis malsupren el ŝvebantaj nuboj. Ĉe la piedo de Gjere-monto aperis blindigaj elektraĵoj lumoj, kiuj plene heligis la teron. La kamarado nin akompananta diris ĝoje: “En oktobro de la pasinta jaro, Tropulli kaj aliaj 25 vilaĝoj sur la montdeklivo jam instalas elektraĵojn lampojn. Rigardu! Kiel brila estas la ruĝa stelo sur la montpinto! Kaj la lumo de sennombraj lampoj sub tiu ruĝa stelo estas ĝuste la heroa monturbo Gjirokastra.”

Kamaradoj de tiu loko diris al mi fiere: “Gjirokastra estas la hejmloko de la granda gvidanto de la albana popolo kamarado Enver Hoxha kaj dum la nacia liberiga milito ĝi estis lulilo de la revolucio; en la agrikultura kooperiga movado ĝi iris la unua en la tuta lando, kaj nun en la granda laboro de efektivigo de lumigo per elektraĵoj lampoj en la vilaĝoj de la tuta lando, ni denove marŝas kiel avangardo!”

Post dutaga vizitado al ĝi, ni pliapaŝe komprenas, ke Gjirokastra skribis en revolucio kaj konstruado superban poemon dum la periodo de la naciliberiga milito ĝis nun!

### LA HEJMLOKO DE PARTIZANOJ

La 7-an de aprilo, 1939, italaj faŝistoj malkaŝe okupis Albanion per armitaj fortoj. En tiu kriza momento de la nacio, la heroa popolo de Gjirokastra brave leviĝis kaj fondiĝis gerilaj taĉmentoj kiel fungoj post printempa pluvo. La plejparto de la partizanoj estis gejunuloj kaj iuj el ili estis malpli ol 15-jaraj. La du batalionoj sub la gvido de la popolaj herooj Asim Zeneli kaj Misto Mame estas sur ĉies langoj en la tuta lando. En la valoj de Mashkullora kaj Kelcyra, ili faris dekojn da intensaj mortaj bataloj kontraŭ germanaj kaj italaj faŝistoj kaj naciperfiduloj, ke la malamikoj falis en panikon. Oni diris ironie: “La italaj banditoj estis lertaj en manĝo de vermicelo, sed kiam ili aŭdis pafojn de gerilaj taĉmentoj, ili tuj svenis pro timo!” La bravegaj partizanoj jen eksplodigis municiejon de la malamiko, jen subite aperis sur monto sur la bordo de Vjosa-rivero, kaptis malamikojn, detruis pontojn per dinamito, kaj armis sin per pafiloj, municio kaj greno militaki-



*Milicanoj kune kun limgarda batalanto sur la landlimo de Gjirokastra*

ritaj el la manoj de la malamiko. En nokto de la 24-a de julio, 1942, partizanoj faris grandskalan aktivadon de interrompo de telekomunikaj interligoj kaj la popola heroo Misto Mame rompis per hakilo 34 telefonajn stangojn en unu nokto.

La gerilaj taĉmentoj estis forte subtenataj de la popolamasoj. Aĝaj avinoj klopodis ĉiamaniere por sendi manĝaĵojn al la partizanoj surmontaj; knabinoj kun malpli ol dek jaroj faris armeajn flagojn kaj brodis ĉapojn por ili. Sur ruĝa flago nun konservata en la antaŭa loĝejo de kamarado Enver Hoxha (la nuna ekspoziciejo de naciliberiga milito en Gjirokastra-regiono) brodiĝis du vicoj da vortoj en grandaj literoj: “Hodiaŭ la ruĝa flago levigis en nia koro, kaj morgaŭ ĝi alte flirtos sur la montpintoj de Albanio!” Kiel la geknaboj tiel la plenaĝuloj tenis altan revolucion singardemon kontraŭ la aktivado de malamikoj. Kaj kiam faŝistaj banditoj aperis sur stratoj, oni tuj informis unu alian per sekretaj signaloj.

Libero devenis de sanga batalo. Por la sendependeco kaj libero de Albanio, kiom da prikantindaj herooj aperis en la heroa urbo Gjirokastra, kies nomoj estas skribitaj orlittere en la historio!

Kun senlima amo al sia heroa Patrio, senlima fideleco al la Partio kaj popolo kaj profunda malamo al la italaj faŝistoj, la patriota knabo Vasili Laçi en Dures pafis kun malamo al la itala reĝo. Sed la kuglo ne trafis kaj li estis arestita. La kruelaj malamikoj lin mortigis. Antaŭ sia martiriĝo, li indigne kondamnis la italan banditan armeon tute sentime: “Kiel ajn arogante vi tiranas, vi tamen ne povas senigi la albanan popolon je ĝiaj majesteco kaj gloro!”

La brava knabino Bule Naipi de la gerila taĉmento estis kaptita en batalo sur Gjeder-monto. La malamikoj torturis ŝin ĉiamaniere, sed akiris nenion el la buŝo de la obstina Naipi. Fine, ŝi laŭte kondamnis la faŝistajn banditojn: “Albana knabino



timas nek kuglon nek maŝon de pendigilo! La gerilaj trupoj baldaŭ liberigos la tutan Albanion kaj venos via fino!” Antaŭ sia martiriĝo, kiam ŝi intervidiĝis kun sia patrino, ŝi diris al ŝi kun rideto: “Panjo, mi estas tre glora, ĉar mi oferos mian vivon por la popolo!” La patrino kaj la filino ne eligis eĉ unu larmeron kaj iliaj brilaj indignaj rigardoj tremigis la malamikojn.

Hodiaŭ, statuo de la popola heroino Bule Naipi majeste staras sur la centra placo de Gjirokastra kaj popolanoj ĝin rigardas kun senlima respekto!

### GRANDA ŜANĜIĜO DE LA MONTURBO

Sub la socialisma sunbrilo ĉie en Gjirokastra vidiĝas vicleco kaj prospereco.

La fizionomio de Gjirokastra tute ŝanĝiĝis. Hodiaŭ, Gjirokastra montriĝas antaŭ ni juna, bela

kaj nova urbo! Malsupren rigardante de la alta kastelo, oni povas vidi transformatoran stacion, traktorajn stacion, fabrikan de metalaĵoj, maŝin-fabrikan, fabrikan de ledŝuoj kaj fabrikan de manĝaĵoj, kies novaj kaj malluksaj loĝejoj por laboristoj montras al ni, ke la urbo Gjirokastra estas rapidege fluganta kiel libera montaglo alte en la aero. La nuna industria produkto de Gjirokastra kreskis 58-oble kompare kun tiu en 1938, kaj ok tagoj jam sufiĉas por produkti tiom da produktaĵoj kiom en unu jaro tiutempe. Antaŭ la liberiĝo, la nombro de la laboristoj de tiu urbo estis malpli ol 400, sed nun jam estas 8,100, inter kiuj 3,500 estas virinoj. La totala industria produktvaloro de 1938 de la tuta urbo okupis nur 5.6 procentojn de la tuta ekonomio de la regiono, sed nun jam 53 procentojn. En 1968, la industria produkto de tiu regiono jam superplenumis la taskon de la plano por 1970.

*Membroj de la agrikultura produkta kooperativo “Flastan” de Gjirokastra laboras en kampo.*



Tiel frue kiel en 1958, Gjirokastra-regiono jam efektivigis agrikulturan kooperigon kaj estis la unua en la tuta lando. La starigo de socialisma produkta interrilato en la vasta kamparo garantiis la rapidan disvolviĝon de agrikulturo. Sub la direktado de la rezolucio de la Kvina Tutlanda Kongreso de la Albana Partio de Laboro kaj kuraĝigo de la batala alvoko de kamarado Enver Hoxha "Iru al la regionoj de montetoj kaj montoj por beligi la montetojn kaj montregionojn, por ke ili fariĝu tiel fruktodonaj kiel la ebenejoj", vastaj amasoj de kamparaj junuloj de la tuta regiono je tri jaroj antaŭdate plenumis la terekspluatan taskon difinitan de la kvara kvinjara plano. Ankaŭ la produktokvanto de grenoj altiĝis mirinde. Antaŭ la Kvina Tutlanda Kongreso de la Albana Partio de Laboro, la pohektara produktokvanto de tritiko estis 800 kilogramoj kaj en 1969 atingis 1,400 kilogramojn. En la jaro 1967, tiu regiono efektivigis memprovizadon de grenoj, unuafoje en sia historio. Gjirokastra-ebenejo kaj Tropulli-ebenejo de ĉiam estis plagataj de sekegeco kaj inundo. Antaŭ kelkaj jaroj, la vastaj amasoj de kooperativanoj pene luktadis kaj ŝanĝis ĝin en riĉan produktejon de grenoj ĉu en sekegeco ĉu en inundo. En areoj de montoj kaj montetoj, oni konstruis 43 akvokonservejojn, el kiuj Dofti-akvokonservejo sola povas irigacii 500 hektarojn da agro. En 1938, la totala areo de irigaciataj kampoj okupis 18.6 procentojn de la totala areo de la agroj de tiu regiono kaj en 1969 ĝi jam atingis 64 procentojn kaj en la jaro 1975 ĝi atingos 80 procentojn. Eĉ en la altaj montareoj de Lunxheria kaj Zagoria oni klopodas konduki akvon sur monton por garantii altan kaj stabilan produkton.

## KRESKAS NOVA GENERACIO

En la revolucia fornego, nova generacio de Gjirokastra kreskas.

La laboristoj de la ledŝua fabriko la unuaj elmetis revolucian proponon al la junularo de la tuta lando: "Marŝu laŭ la glora spuro de batalo kaj laboro!" Stimulate kaj kuraĝigate de tiu revolucia propono, la junulaj organizoj de fabrikoj, entreprenoj, lernejoj kaj institucioj starigis milit-trejnajn organizojn por gejunuloj. Ili marŝas kaj kampadas sur altaj montoj kiel batalantoj, vizitas muzeojn kaj tombojn de martiroj kaj herooj, aŭskultas rakontojn de veteranaj partizanoj pri iliaj bataloj, interparolas kun maljunaj laboristoj, akceptas edukadon pri la revolucia tradicio kaj lernas la

revolucian spiriton de la revoluciaj antaŭuloj kuraĝi batali kaj kuraĝi venki.

La urboj subtenu la kamparon, la ebenejoj subtenu la montregionojn kaj la revoluciaj junuloj iru kulturi virgan teron en la plej malproksimaj kaj plej malfacilaj lokoj kaj konstrui socialisman novan kamparon kune kun la kamparanoj — tiu alta revolucia idealo donis al la junuloj de Gjirokastra memfidon kaj fortojn. Nombroj post nombroj da junuloj kaj knabinoj iris al la montregionoj Kukesi kaj Puka por batali kontraŭ frosto kaj neĝoblovego kaj akiri grenon de la altaj montoj! La knabina grupo, kiu iris al Kukesi en 1969, kulturebligis jam dek hektarojn da agro.

La junaj gestudentoj entuziasme sin ĵetis en la vivon de lernado, laborado kaj milita trejnado. En la mezlernejo Asim Zeneli ni intervidiĝis kun sangvinaj junuloj. Apud la klasĉambro kuŝas brile purigitaj mitraloj. Apenaŭ kelkajn minutojn post kolektiĝa signalo, la lernantoj jam surmetis armeajn uniformojn kaj pretigis siajn pafilojn kaj tornistrojn. Ĉu junuloj ĉu knabinoj, ĉiuj imponas per brava aspekto kaj alta batalvolo. Respondeca kamarado de la regiona komitato de la Partio diris al ni: "La gejunuloj de tiu ĉi lernejo ne nur akiris elstaran atingon en studo de la partia historio kaj verkoj de kamarado Hoxha kaj en milita trejnado, sed ankaŭ ĉiam laboras avangarde dum la volonta laboro de la tuta lando." Ni vidis tie multajn ruĝajn flagojn kaj honorajn foliojn, kiujn la gejunuloj gajnis en milita trejnado kaj volonta laboro.

Same kiel sur la aliaj batalfrontoj de la lando, en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado de Gjirokastra aperis multaj komunismaj novaj homoj, kiuj estas tute senegoismaj, zorgas nur pri la kolektivo, neniom timas morton kaj havas noblan stilon. Foje, ekbrulis la transformatora stacio pro perturbo en cirkvito. En la kriza momento minacanta la sekurecon de ŝtataj posedaĵoj kaj homoj, la metalajistoj Lloĉkua, Kaĉi kaj Sino tute sinforgese trovis senkonsterniĝe la ŝaltilon meze de ardaj flamoj kaj densaj fumo, rompis la kurenton, estingis la fajregon kaj tiel elsavis ŝtatajn posedaĵojn.

Senĉese fluas la fontoj de Gjere-monto, kaj senfine sonas la kantoj pri la heroo monturbo! Ho Gjirokastra, vi lulilo de la revolucio de Albanio, kiam ni forlasas vin kun profunda proletara amo al vi, ni esprimu al vi niajn plej korajn bondezirojn: Vi ĉiam restu ruĝa, ĉiam batalu sur la revolucia plejfronto!



# Sato kaj la Sovetunia

## Reviziismo Intensigas Sian Koluzion

### kontraŭ Ĉinio

**L**A *Popola Novaĵo* eldonata de la Societo por Studo de Maŭzedongpenso en Japanio publikigis artikolon, kiu malkaŝis la krimojn de la japana reaktiularo kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko en intensigo de kontraŭrevolucia koluzio.

La artikolo montris: La japana delegitaro, kiu ĉeestis la kvaran kunvenon de la Japana kaj Sovetunia Ekonomia Kunigita Komitato okazintan en Moskvo je februaro, estis estrita de Ŝigeo Nagano, la prezidanto de la Komerca kaj Industria Ĉambro de Japanio kaj ĝenerala direktoro de la fera kompanio "Fuĝi", kaj formita el la reprezentantoj de Micubiŝi, Micui, Sumitomo kaj aliaj grupoj de monopola kapitalo kaj kernaj oficistoj de la financa ministerio, fremdlandkomerca kaj industria ministerio kaj de la importa kaj eksporta banko de la reakcia Sato-registaro. Ĝi estis delegitaro vere zorgeme elektita de la japana monopola kapitalo kaj la naciperfida Sato-registaro. Tio montras, kiel "fervoraj" estas la japanaj naciperfidaj reakciaj fortoj al "la ekonomia kunlaboro inter Japanio kaj Sovetunio".

La artikolo diris: La sovetunia flanko faris ĉion eblan por "gastigi" la japanan delegitaron. Eĉ Kosigin elpaŝis persone por ne paroli pri la koncernaj ministroj. Tio montras, ke ankaŭ la sovetunia flanko estas tre "fervora" por la "kunlaboro" kun la japana monopola kapitalo kaj la naciperfida Sato-registaro.

La artikolo diris: La komerco en la lasta jaro inter Japanio kaj Sovetunio pliiĝis krute kaj ĝia totala sumo superis 700,000,000 usonajn dolarojn.

El la varoj importitaj de Japanio el Sovetunio, tre grandan proporcion okupis la materialoj nun plej bezonataj de la japana monopola kapitalo kiaj kotono, ligno, karbo kaj petrolo. Jam delonge la japana monopola kapitalo soifas al la neeksploatataj subteraj fontoj de industriaj materialoj en Siberio.

La artikolo montris: "La ekonomia kunlaboro inter Japanio kaj Sovetunio" estas parto de la mondsfera kunlaboro inter Usono kaj Sovetunio kaj de la agresa plano de la usona imperiismo kontraŭ Azio.

La artikolo diris: Post la Dua Mondmilito, la japanaj monopola kapitalo kaj militarismaj fortoj kiel pordogarda hundo de la usona imperiismo denove montras sian grandan intereson pri la siberia teritorio de Sovetunio kaj elpendis la ŝildon de "kunlaboro inter Japanio kaj Sovetunio" jam en la jaro 1956.

La artikolo malkaŝis: Ĝuste en tiu jaro Ĥruŝĉov plenenergie fanfaronis en la 20-a kongreso de la Sovetunia Komunista Partio pri "eksploato de Siberio". Liaj heredantoj Breĵnev, Kosigin kaj similaj vendis ne nur la naciajn interesojn kaj suverenecon de Sovetunio sed ankaŭ ĝian teritorion. Ili komencis enkonduki fremdlandan kapitalon por "eksploati Siberion". La artikolo montris,

ke tio lumigis la verdan lampon al la japana monopola kapitalo por enstrudiĝi en Siberion.

La artikolo diris: Ke la japana monopola kapitalo publike komencas ekspluati arbarojn de Sovetunio, tio estis neimagebla en la tempoj de Lenin kaj Stalin. Je la 28-a de marto de la kurlanta jaro, aeroplano de la Japana Aviada Kompanio kun insigno de "suna flago" unuafoje komencos regulan flugon al Moskvo senbride tra la aera teritorio de Sovetunio.

La artikolo diris: En tiu kunveno de la nomita komitato, la sovetunia reviziisma renegata kliko eĉ petegis la japanan flankon helpi en "ekspuato de Siberio". Ili deziris, ke la japana monopola kapitalo prenu la tutan respondecon por meti tublinion de la Jakuta Aŭtonoma Respubliko interne de Sovetunio ĝis la pacifika bordo por faciligi la liveradon de natura gaso al Japanio. La konstruo de la haveno Vrangelja apud Naĥodka estis alia sovetunia peto, kiun la japana flanko jam akceptis.

La artikolo montris: Se Sovetunio estus kolonio, ĉio ĉi tio estus iel komprenebla. Sed, oni neniam aŭdis, ke por konstrui sian havenon sendependa lando petas helpon de fremdlanda monopola kapitalo. Oni povas vidi, jam ĝis kia grado la sovetunia reviziismo degeneris!

La artikolo diris plue: Absolute ne estas nur el ekonomia konsidero, ke la japana naciperfida monopola kapitalo kaj la sovetunia reviziisma renegata kliko estas tiel fervoraj al "la ekonomia kunlaboro inter Japanio kaj Sovetunio". Ili havas ankaŭ politikan kaj militan celojn.

La artikolo diris: Pro kapitalisma restaŭro, la ekonomio de Sovetunio jam eniris en senlirejon. Evidente, la bando de Breĵnev kaj Kosigin volas liberigi sin el embaraso per vendo de siaj naciaj interesoj al fremdlanda imperiismo.

La artikolo montris: Sub la gvido de kamarado Maŭ Zedong, Ĉinio alte tenas la grandan standardon de Marksismo-Leninismo-Maŭzedongpenso kaj plifortigas la proletaran diktaturon. La disvolviĝo de tiel potenca socialisma lando estas la plej granda teruro por Breĵnev, Kosigin

kaj similaj. Por la sovetunia popolo, la socialisma Ĉinio estas magia spegulo, kiu plene montras la veran aspekton de la sovetunia reviziisma renegata kliko.

La artikolo diris: Opono kontraŭ la socialisma Ĉinio estas la espero de la usona imperiismo kaj ankaŭ la tasko, kiun la lasta metis sur la bandon de Breĵnev kaj Kosigin. Kaj por tiuj, tio estas tute certa nepre noti en ilian agendon la "interhelpon kaj kunlaboron" kun la japanaj monopola kapitalo kaj militarismaj fortoj, avangardo de la usona imperiismo por agresi Azion kaj oponi Ĉinion. Ĝuste en tio kuŝas la esenco de "la ekonomia kunlaboro inter Japanio kaj Sovetunio".

La artikolo je la fino alvokas la japanan popolon frakasi la usonan imperiismon kaj ĝiajn lakeojn, la japanajn reakciajn fortojn kaj la renegatan Mijamoto-klikon per praktikaj agoj en la patriota batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la reviziismo.

*Japanaj popolanoj manifestacias kontraŭ la sovetunia social-imperiismo.*





## “Bonkoreco” de Lupo

LA ĉefo de la usona imperiismo Nixon faris paroladon pri sia “nova politiko” koncerne al Latinameriko, en kiu li energie distrumpetis pri starigo de “nova interrilato” kun Latinameriko kaj ĵuris per la ĉielo, ke li pretas “agadi por progreso de Ameriko” tra “nova vojo”. Kaj tuj poste, en sia alia raporto pri ekstera politiko, Nixon multe parolis pri tiel nomata “nova interrilato” kun la latinamerikaj landoj. Ĉio ĉi tio vive montras lian vizaĝon de “bonkora” bodisatvo.

Kia varo estas la menciita “nova politiko” kaj “nova interrilato” tiom agrable preparolataj de Nixon? Kiam “tigro recitas sutron”, ĉu ĝi celas “fari bonon” aŭ “manĝi homon”? Klaran respondon donis la raporto pri Latinameriko farita de Nelson A. Rockefeller, speciala sendito de Nixon. Ankaŭ Nixon mem konfesis, ke lia “nova politiko” pri Latinameriko “konkretiĝis el la raporto prezentita de ŝtatestro Rockefeller”, kaj energie laŭdis ke la raporto de la lasta prezentis “tutan serion da malproksimevidaj proponoj”.

Kion Rockefeller kolportis en la raporto?

Unue, Rockefeller proponis ke Usono “provizu al Latinameriko moralan gvidon kiel forton favoran al justeco kaj libero en Ameriko” por “konstrui pli efikan mondordon”.

La usona imperiismo dekomence rigardas Latinamerikon kiel sian “postan korton”, ĉiam apogas la diverslandajn reakciajn fortojn kaj subpremas la revoluciajn batalojn de la popoloj en Latinameriko. “Subteni justecon kaj liberon en Ameriko”, pri kio parolis Rockefeller, estas simpla trompo! Por diri malkaŝe, tio estas nenio alia ol subteni la prousonajn militajn diktatorajn reĝimojn en latinamerikaj landoj kaj subteni ilian liberon de subpremo, sklavigo, ekspluato kaj sensukigo al la laboranta popolo, fakte la liberon de la usona imperiismo por prirabi koloniojn kaj agresi kaj

sklavigi la popolojn de latinamerikaj landoj. La t. n. “morala gvido” de Usono super Latinameriko ja signifas daŭran kontrolon super la reakciularoj de latinamerikaj landoj kaj plian tenadon de novkoloniisma regado de la usona imperiismo en Latinameriko.

Due, li proponis ke Usono pliigu siajn “donacojn” de milita helpo al latinamerikaj landoj kaj “kunlaboru” kun ili “en alpreno de rimedoj por plifortigi internan sekurecon”.

De longa tempo, por kontroli kaj sklavigi Latinamerikon la usona imperiismo kontraktis “duflankan defendan kaj interhelpan traktaton” unu post alia kun dekelkaj latinamerikaj landoj, sendis kelkdek militajn konsilantarojn al ili kaj starigis serion da militaj bazoj en Latinameriko. Sole en siaj militbazoj en Panamo, Usono garnizonigis ĉirkaŭ dek mil usonajn armeanojn. La propono de Rockefeller farita en lia raporto pri plifortigo de “kunlaboro” kun la latinamerikaj landoj signifas pliapaŝe pliintensigi la koluzion kun la reakciaj fortoj de latinamerikaj landoj por ankoraŭ pli rigore subpremi la arde leviĝantan revolucionan batalon de la latinamerikaj popoloj. Rockefeller emfazis ripetade en sia raporto, ke necesas “daŭrigi kaj plifortigi” la trejnadon de la reakciaj “armeanoj kaj policanoj” de latinamerikaj landoj kaj tutforte pliigi daŭre “donacojn” de milita helpo al la latinamerikaj reakciaj registaroj. Li eĉ trovis neceson fari detalan liston — de malgrandkalibraj pafiloj, kamionoj, ŝipoj kaj radiofoniaj aparatoj ĝis “aeroplanoj, militaj ŝipoj kaj aliaj grandaj militaj ekipaĵoj” — por plene “kontentigi” la bezonojn de la latinamerikaj reakciularoj. Ĉu oni ne vidas jam el tiu listo de hommortigiloj la sangajn faktojn masakri la latinamerikajn revoluciajn popolojn kaj kruele subpremi iliajn revoluciajn batalojn per grandaj kvantoj da mono kaj armiloj liverataj de la usona imperiismo kaj per armeanoj liverataj de la latinamerikaj reakciaj registaroj?

Trie, li proponis ke Usono plivastigu la komercon kun la latinamerikaj landoj, "faru klopodojn por realigi plejble grandan disvolvon de reciproke kontentiga interŝanĝo", kaj por tio "ne konsideru" siajn "specialajn interesojn" ktp.

Ĉiuj scias, ke Latinameriko jam delonge fariĝis strategia bazo de la usona imperiismo por hegemonio super la tuta terglobo kaj grava loko por grandakvante eksporti kapitalon, prirabi abundajn strategiajn materialojn, elpremi supergrandajn profitojn kaj transŝarĝi sian ekonomian krizon. La komerco de la usona imperiismo kun latinamerikaj landoj estas tute raba. Per importaj limigoj kaj varinterŝanĝo en neegalaj prezoj, la usona imperiismo ĉiamaniere reduktas la prezojn de eksportaj krudmaterialoj de latinamerikaj landoj kaj senĉese altigas la prezojn de usonaj fabrikoj por eltordi grandajn profitojn kaŭzante pezajn perdojn al la latinamerikaj landoj. Ekzemple, pro redukto de la prezo de kupra erco fare de Usono en la komenco de 1964, Ĉilio malprofitis pli ol 160,000,000 usonajn dolarojn en malpli ol unu kaj duono da jaroj. En 1954 Kolombio povis ricevi unu usonan ĵipon kontraŭ 14 sakoj da kafo, sed en 1968 por ricevi la samon, ĝi jam devis liveri 43 sakojn. En la lastaj jaroj la latinamerikaj landoj ĉiujare perdis pli ol miliardon da usonaj dolaroj pro la redukto de la prezoj de krudmaterialoj fare de Usono. La usona monopola kapitalo estas la plej granda internacia fikomercisto. Ĉu ne estas tre ridinda la fanfaronado de Rockefeller pri "reciproke kontentiga" interŝanĝo kaj "nekon-sidero" de "specialaj interesoj" de Usono?!

Uzi novan terminon kaj elpendigi novan ŝildon por kovri la sangajn krimojn de daŭra superrego, agreso, sklavigo, prirabado kaj subpremado al la latinamerikaj popoloj estas la reakcia esenco de la "nova politiko" de la usona imperiismo kontraŭ Latinameriko.

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"Imperiismo pelas la popolamasojn de la tuta mondo iri en la historian epokon de granda batalo por ekstermi imperiismon."** La sepdekaj jaroj estos epoko, en kiu pli furiozos la revolucia ŝtormo de la latinamerikaj popoloj kaj pli rapide falos la regado de la usona imperiismo en Latinameriko. La nova manovro de Nixon kaj similaj igos la latinamerikajn popolojn pli klare vidi la veran lupan vizaĝon de la insidema, ruza usona imperiismo kaj ĝian reakcian, malfortan naturon de papertigro kaj tiel ekbruligi flaman fajregon de pli grandskala kontraŭusona batalo, kiu cindrigos tiun kruelan, agoniantan lupon.



## BALASTO-PURIGA MAŜINO

Laboristoj de la ĝenerala inĝenera brigado de la Ĝingou-a Fervoja Buroo en Liaŭning-provinco lastatempe sukcese provfabrikis balasto-purigan maŝinon.

Purigado de balasto sur fervoja linio estas grava aranĝo por garantii sekuran kaj altrapidan veturadon de trajnoj. La ĉefa tasko de tiu laboro estas forigi la akumulitan polvon el la balasto, por ke akvo povu facile dreniĝi, la ŝpaloj ne putriĝu kaj la linio ne estu difektita de glaciigo. En la pasinteco, tiu laboro estis plenumita de laboristoj kun malalta laborofiko kaj granda fortostreĉo.

La dirita balasto-puriga maŝino kun simpla strukturo estas facile manipulebla kaj bone efikas. Ĝi povas purigi 10 kubmetrojn da gruzoj meznombro en ĉiu minuto, t. e. 3-oble pli rapide ol homlaboro.

## TUBOKALDRONEGO DE POSTRESTA

### VARMO

La Fajenca Fabriko de Hungiang havas tri fornegojn por produkto de fajencoj kaj krome ankaŭ 42 fajrujojn por plenumi aliajn akcesorajn produktajn laborojn kaj vivbezonojn. Kvankam la 42 fajrujoj servas por plenumo de akcesoraj laboroj, ili tamen konsumas nemalpli multe da karbo ol la tri grandaj fornoj. Laboristoj trovis, ke granda kvanto de ĉirkaŭ 1,000-grada varmo postrestas el la produkta procedo de la grandaj fornoj kaj estas malŝparita. Ili faris per siaj propraj manoj tubokaldronegon de postresta varmo por plene utiligi la postrestan varmon de la fajencaj fornejoj. La temperaturo de la varma akvo el tiu kaldronego atingis pli ol 150 gradojn C, kaj tiu akvo ne nur garantias, ke la temperaturo en la sekigaj ĉambroj ĉiam restu 70 ĝis 80 gradoj, sed ankaŭ solvis la problemon de varmigo de la tuta fabriko en vintro. Laŭ unuapaŝa kalkulo, tiu renovigo povas ŝparigi 4,000 tunojn da karbo en ĉiu jaro.





## PALESTINAJ PARTIZANOJ DECIDIS PERSISTI EN LONGDAŬRA ARMITA BATALO

En la 23-a de marto, palestina partizano diris al raportisto de Hinhua-Novajagentejo en Damasko: "Ni kategorie rifuzas la 'rezolucio' de la Sekura Konsilantaro de UNO kaj aliajn planojn pri 'paca solvo' de la problemo de Mezoriento. Ni firme malkovras la intrigon de kvarpotenca interparolo kaj absolute ne kompromisos kun imperiismo kaj cionismo. Ni devas nepre persisti en nia armita batalo ĝis la okupitaj teritorioj de arabaj landoj kaj Palestino estos komplete liberigitaj."

Li daŭrigis: "Prezidanto Maŭ instruis al ni: 'Ni devas subteni ĉion, kion la malamiko oponas, kaj oponi ĉion, kion la malamiko subtenas.' Nun la malamiko intensigas sian agadon por atingi 'pacan solvon' per milita premo kaj politika trompo kaj eĉ kreis falsan palestinan gerilan organizon kiu intencas penetri en nian internon por subfosi nian armitan batalon. Sekve, ni devas pli firme oponi la intrigon de 'paca solvo' kaj renversajn agadojn kaj persisti en armita batalo."

Li diris: "Nia batalo estos longa kaj malfacila, sed apogante nin sur la vastaj popolamasoj kaj niaj propraĵoj kaj persistante en batalo, ni certe povos gajni la finan venkon."

La partizano tre laŭdis la subtenon, kiun donis la ĉina popolo al la armita batalo de la palestina popolo. Li diris: "Ni estas dankemaj al la ĉina popolo, kiu donas firman kaj efikan apogon sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ al la liberiga afero de Palestino. Ĉinio neniam rekonis Izraelon kaj konstante subtenas la justan batalon de la arabaj popoloj. Tio estas starpunkto ĝusta, revolucia kaj vere marksism-leninisma."

## KUNVENO EN BAGDADO POR CELEBRI DATREVENON DE LA VENKO DE KARAMAH

En Bagdado, la ĉefurbo de Irako, mil personoj de diversaj socitavoloj kunvenis vespere de la 22-a de marto por varme celebri la duan datrevenon de la venko de la batalo de Karamah. La tuta kunvenantaro varme akklamis la grandan venkon de la palestinaj partizanoj en ilia armita batalo kontraŭ la usona imperiismo kaj la izraela cionismo por la liberigo de la nacio kaj esprimis sian decidon konduki la palestinan revolucion ĝis la fino.

La kunvenon organizis la bagdada oficejo de la Palestina Naciliberiga Movado (Fatah).

La kunvenon ĉeestis Salah Omar Al Ali, membro de la Iraka Revolucia Komanda Konsilantaro kaj ministro de agrikulturo, kaj aliaj oficistoj de la iraka registaro kaj reprezentantoj de diversaj palestinaj naciismaj organizoj en Bagdado.

Ankaŭ Ĝang Ŝu, provizora komisiito de la ĉina ambasado, ĉeestis la kunvenon laŭ invito.

Reprezentanto de la bagdada oficejo de "Fatah" parolis en la kunveno. Li diris, ke la granda venko de la batalo de Karamah formas senmortan ĉapitron en la historio de la arabaj nacioj.

Li forte kondamnis la kriman intrigon trudi al la arabaj popoloj la kapitulacisman projekton de "paca solvo" de la problemo de Mezoriento kaj tiel strangoli la armitan batalon de la palestina popolo. Li ree emfazis, ke la palestina popolo decide rifuzas projekton de la t. n. "paca solvo" en ĉia formo.

Omar Al Ali, membro de Iraka Revolucia Komanda Konsilantaro, esprimis en sia parolado, ke la iraka registaro kaj iraka popolo subtenas la gerilan agadon de la palestina popolo.

## NOVAJ VENKOJ DE LA PATRIOTAJ ARMITAJ FORTOJ DE GVINEO (BISSAU)

Laŭ milita komunikado publikigita lastatempe de la Afrika Sendependa Partio de Gvineo kaj Kabo Verde, en februaro ĉi-jare, la patriotaj armitaj fortoj de Gvineo (Bissau) mortigis 59 soldatojn de la portugala kolonia armeo en siaj pluraj atakoj kontraŭ la lasta en la norda parto de Gvineo (Bissau).

La komunikado diris, ke la patriotaj armitaj fortoj de Gvineo (Bissau) detruis 6 kamionojn kaj 1 kirasaŭton de la portugala kolonia armeo dum sia embusko apud komunikaj linioj. Ili atakis ankaŭ frontajn poziciojn de la malamiko sur la norda batallinio.

*Per fruktarbo kiel ŝirmilo partizano de Palestino pafas al izraelaj cionistoj.*





# Rakonto

## pri Aĉeto de Bovoj kaj Ĉevalo

ANTAŬ la Printempa Festo de la kuranta jaro, la tria produkta grupo de Giacun-vilaĝo en Ĝenggia-komunumo de Hjunji-gubernio, Ŝenhi-provinco, aĉetis sinsekve tri bovojn kaj unu ĉevalon. Ĉiuj komunumanoj de la grupo diris ĝoje: "Jen estas ĝusta vojo al socialismo!" Ĉar la aĉeto de la brutoj estis rezulto de pliprofunda kritiko de kapitalisma tendenco kaj plialtigo de socialisma konscio de la membroj de la tuta grupo.

En la pasinta jaro la grupo akumulis 700 *yuan* el la enspezoj de flankaj okupoj. Iuj proponis dividi komplete la tutan sumon inter la membroj, por ke ili povu bone pasigi sian Printempan Feston. Sed la maljunaj malriĉkampanoj de la grupo firme oponis kontraŭ tiu propono. Ili opiniis ke la grupo bezonas pliigi siajn produktajn rimedojn kaj plugrubutojn kaj ke la ĝusta vojo socialisma estas uzi monon por disvolvi agrikulturan produkton.

Post diskutado la komunumanoj de la tuta grupo pli profunde ekonis, ke "dividi komplete" malutilas al disvolvo de kolektiva ekonomio kaj estas kapitalisma tendenco. Oni unuanime decidis uzi la monon por aĉeti bovojn.

La sekvintan tagon la maljuna grupestro iris kun iu komunumano por aĉeti bovojn en la foiro, kiu distancas de la grupo je vojaĝo de 4-5 tagoj. Ili elektis tie tri bovojn post detala ekzameno. Sed por pagi la prezon, la mono kunportita

por tio ne sufiĉis je 25 *yuan*. Kaj restis el la mono por vojaĝelspezoj nur 26 *yuan*. Kion fari? Rigardante la manĝaĵosakon, la grupestro diris al la akompananto: "Nu ni kovru la deficiton per la mono por vojaĝo. Sufiĉas unu *yuan* por aĉeti furaĝon por la bovoj dum la vojaĝo. Manĝante la sekan manĝaĵon kaj trinkante malvarman akvon, ni certe povos ankaŭ peli la bovojn ĝis la vilaĝo." Tiel ili aĉetis tri bovojn por la grupo.

Nelonge antaŭ ol la grupestro revenis de la vojaĝo, la supera instanco distribuis al la grupo unu ĉevalon. La grupanoj ankoraŭ pli ĝojiĝis. La kadroj de la grupo tuj kunvokis kunvenon por diskuti la problemon, kiel havigi la mankantajn 200 *yuan* por kovri la pagon por la ĉevalo.

La eksarmeano Lu Kinglin la unua leviĝis, dirante: "Por plifortigi la kolektivitan ekonomion kaj disvolvi socialisman agrikulturon, mi decidis ŝpareme pasigi la Printempan Feston laŭ instruo de Prezidanto Maŭ kaj pruntedoni al la grupo la 30 *yuan*, kiujn mia familio lastatempe ricevis el nia laborpago. Post li ankaŭ multaj aliaj komunumanoj anoncis sin por pruntedoni monon al la grupo. Tre rapide estis kolektitaj la bezonataj 200 *yuan*.

La kadroj ĝoje diris: "Kiam ĉiuj turnas sian koron al la kolektivo, ni por ĉiam ne devios de la vojo de socialismo."

## Korespondi Deziras

### Cejlono

Dez. kor. kun geesperantistoj kaj i.ŝ. poŝtmarkojn kaj bildkartojn:

24-jara struktura inĝeniero M.M. Wickramasinghe, Helawatta, Diyatalawa

20-jara teknika desegnisto M.M. Wijesinha, Helawatta, Diyatalawa

23-jara esp-ino R. M. Rosalin Nona, Helawatta, Diyatalawa

15-jara esp-ino M. M. Ranjane, Helawatta, Diyatalawa

18-jara esp-isto M. M. Munasinghe, Helawatta, Diyatalawa

### Ĉeĥoslovakio

Deziras korespondi kun geesperantistoj de la mondo kaj interŝanĝi b.k. kaj p.m. jenaj esperantistoj:

VLADA HASALA, S.K.N. 37, Hodonin, ĈSSR

DRAHOMIRA STANEKOVA, Vajanskeho 10, Martin, ĈSSR  
Miroslav Barton, Ĉechova cp. 1271, Turnovll, ĈSSR

Dr. Jaroslav Joza, ekonomo, 54-jara, Manesova 117, Humpolec, ĈSSR

### Japanio

Doura-Kazuo, dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj. Lia adreso: Kibogaoka 4-8-14, Chikusa-ku, Nagoya

### Norvegio

Rolf Solberg, dez. kor. kaj i.ŝ. gazetojn, p.m., p. k. kaj monerojn. Lia adreso: Solvergveien 16, N-1300 Sandvika

### Rumanio

26-jara studento Denes Emerio, kor. dez. kun esperantistoj de Ĉ.L. pri elektroniko, literaturo, kaj i.ŝ. b.k. kaj p.m. Lia adreso: str. Paris Nr. 103, Cluj



## Letero de Finnlanda Leganto T.T.

En via revuo mi legis la tekston de la teatraĵo "Sagaca Kopto de la Tigra Monto", kiu tuj fascinis min per la forto de esprimo en vortoj kaj agoj. La kolorbildoj estas luksaj kaj donas bonan imagon pri la certe perfekta arta prezento sur la scenejo. Tiu ĉi teatraĵo estas brila kombino de realismo kaj romantiko, ambaŭ kompreneble ĉiam revoluciaj. La klasa amo de Jang Zifong al ĉiuj siaj kunuloj kaj la klasa malamo kontraŭ ferocaj kaj ruzaj malamikoj prezentas literaturajn efektivigitan sur scenejo plej puran kaj altnivelan en la nuna erao, kiam dekadencaj muzikaĵoj kiel la amerika "Hair" entrudigas en la landojn de okcidenta Eŭropo, ankaŭ en nian landon, kaj donas malbonajn influojn al la junularo pere de siaj "hippie"-

moralo kaj ideologia sinteno al la fenomenoj nuntempaj en la socio, kie multaj estas senlaboraj kaj vivas en manko de vivrimedoj.

Antaŭ nelonge mi legis la deklaron de kamarado Maŭ Zedong, prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, por subteni la batalon de la usonaj nigruloj kontraŭ perforta subpremo la 16-an de aprilo 1968 dum "la longa varmega somero" plena je rasaj demonstracioj kaj tumultoj en Norda Ameriko. Kamarado Maŭ Zedong pravas, mi devas diri leginte la libron, en tio ke la kunligiĝo de nigruloj kun la usona laborista movado likvidos fine la kriman regadon de la usona monopola burĝaro. La inflacio en Usono pasintajare atingis 6% laŭ mia scio, dum la koncerna procento ekzemple en nia lando estis 1.7%. La alta procento de la altiĝo de la prezoj estas ja rezulto de la kapitalisma stereotipa mas-trumado kaj ekonomiko.

## Letero de Itala Leganto L.P.

En la lasta tempo, la burĝara gazetaro intensigas sian kalumni-

adon kontraŭ la socialisma Ĉinio per mensoga kaj agita lingvo. Tia sinteno de la burĝaro estas tipa veado de agonianto. Certe, vastaj popolamasoj sin armas ĉiam pli per Marksismo - Leninismo - Maŭzedongpenso. Tion oni povas vidi el la januara manifestacio de la milanaj popoloj, kiun ankaŭ mi partoprenis.

En la 31-a de januaro, kvindek mil manifestaciantoj kontraŭ la monopola burĝaro laŭte krias la nomojn de Lenin, Stalin kaj Maŭ Zedong. Iliaj ĉefaj sloganoj estas tiaj, kia "Renversu la burĝaran ŝtaton, sed ne reformu!"

Kamaradoj, en Italio la subpremo farata de la monopola burĝaro estas pli kaj pli kruela. . . . sed ni komprenis, ke ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj, tial ni neniam povas forlasi nian batalan postenon.

La italaj revoluciuloj fidas Maŭzedongpenson kiel la spiritan atombombon kaj la batalan internaciismon de la revolucia ĉina popolo.

Longan kaj longan vivon al Prezidanto Maŭ! Pli luman estontecon al la ĉina popolo!



*Strika manifestacio de laboristoj de Milano de Italio*

## *Sur la Kovrilo:*

Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, la vastaj amasoj de revoluciaj laboristoj kaj oficistoj de la Pekina Medicina Instrumenta Fabriko “Laboristo, Kamparano kaj Soldato” aktive produktas novtipajn medicinajn instrumentojn malkarajn, malpezajn kaj facile portebajn kaj tiel kreis favoran kondiĉon al la vastaj amasoj de medicinaj laborantoj irantaj al montoj kaj kamparo en servo al malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamparanoj por preventi kaj kuraci malsanojn. Jen la laboristoj kontrolas duonkondukantan medicinan aparaton.

## *Sur la Dorskovrilo:*

ĈPLA-anoj kaj popolanoj kune kolektas rarajn drogherbojn.

## Ĉefa Enhavo

La Vojo de Disvolviĝo de la Ĉina Medicino

Kuraci Oftajn Malsanojn per Materiisma Dialektiko

Rondira Kuractaĉmento sur la Stepo Banma

Ja Tre Bona Estas la Kombiniĝo de la Ĉina kaj Okcidenta Medicinoj

Modela Pura Vilaĝo Kilo

Ŝanĝiĝo en Lernejo por Surdmutuloj

Mi Rekunigis Rompitajn Fingrojn per Drogherboj

La Spirito de N. Bethune Lin Rejunigis

Ĉina Kuraca Taĉmento en Somalio

Malnova Fabriko sur Nova Vojo

Fabriko Bonvena al Komunumanoj

Giganta Ŝanĝo en Kvin Jaroj

Novaj Atingoj en Industrio de Ŝanhajo

Relerno dum Fizika Laboro

Anna Louise Strong, Fama Usona Progresema Verkistino, Forpasis en Pekino

Heroa Monturbo Gjirokastra

Sato kaj la Sovetunia Reviziismo Intensigas Sian Koluzion kontraŭ Ĉinio

“Bonkoreco” de Lupo



# Kuraca Taĉmento de PLA en Jan-an

Kuracaj laborantoj de la hospitalo vizitas la kavernon en Jan-an antaŭe loĝatan de Prezidanto Maŭ, por studi la grandan revolucion praktikon de Prezidanto Maŭ.




Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**meti la gravitan punkton de la kuraca kaj higiena laboro en la kamparon**”, la kuraca taĉmento de la Ĝenerala Hospitalo de PLA venis al la regiono de Jan-an, varme propagandis Maŭzedongpenson, faris kuracadon por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kulturis pli ol 6,000 “nudpiedajn kuracistojn” por la kamparo kaj helpis pli ol 590 produktajn brigadojn starigi sistemon de kooperativa kuracado. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj laŭdis ilin: “PLA-anoj senditaj de Prezidanto Maŭ estas niaj plej karaj intimuloj.”

Alprenante rimedon de rondira kuracado ĉe kamparanoj, kamaradoj de la taĉmento kaj partoprenas la kolektivajn produktajn laborojn kaj ĝustatempe faras kuracadon por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.







Kamaradinoj de la taĉmento entuziasme helpas malriĉkamaraninojn kaj malsuperajn mezkam-  
paraninojn en hejmmastrumado. La armeanoj kaj popolanoj ja intimas kiel samfamilianoj.



Kamaradoj de la taĉmento persistas en partopreno de la produkta laboro kaj modeste lernas de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj.

Kamaradoj de la taĉmento invitis maljunan malriĉkamaraninon rakonti al ili pri la suferplena vivo en la malnova socio kaj la feliĉaj tagoj en la nova socio, kaj kune kun ŝi disvolvas la revolucion kritikadon.







Kamaradino de la taĉmento kaj onklino malriĉkamarinino kune studas verkon de Prezidanto Maŭ.

